

ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 643 (6)

Junio 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

esperanto

JUNIO 1959

52 a JARO

REVUO INTERNACIA N-RO 643 (6)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C.,
Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) antaŭ
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represajon
al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Cefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld 1/2 paĝo 64,— gld 1/4 paĝo 32,— gld
1/8 paĝo 16,— gld 1/16 paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,
Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj,
viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO PREZENTAS :

La malnova urbmuo de Varsovio.

Enhavo

Jaro sen defcito	101
Belarta Konkurso	101
Sperto — ne prokrastu	102
La Magnetofona servo de U.E.A.	102
Okaze de la Zamenhof-jaro	103
Rememoroj pri la lastaj jaroj	105
Konkreta rezulto en Delhi	106
Demonstracia Kongreso	109
Internaciaj ferioj	109
Esperanto ankoraŭ allogas la publikon	110
Zamenhofaj memortagoj en Varsovio	110
De traba Kabano	111
Oficiala Bulteno	112
Alvoko	117
La poŝtmarkkolektado	117

Rubrikoj :

CED	107
La juna Vivo	108
Radio-Babiloj	109
La Internaciaj Konkursoj 1959	109
Krucvort-enigmo	113
Tra la Mondo	114
Esperantista Vivo & Nekrologo	115
Radio	115
44-a U.K. de Esperanto	116
Oficiala Informilo	117

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Jaro sen Deficito

Unu el la rimarkindaj rezultoj en la agado de U.E.A. en 1958 estas, ke tiu jaro finiĝis finance sen deficito.

De kiam estis fondita U.E.A. la financa problemo ĉiam estis malfacila kaj kelkfoje eĉ embarasa. La financaj raportoj ĉiujare montradis deficiton. Inter 1948 kaj 1955, kiam la kontoj estis farataj en anglaj pundoj, la ĉiujara deficito estis ronde inter 100 pundoj (ekzemple en 1949) kaj 360 (ekzemple en 1951). La solaj jaroj, en kiuj formale ne ekzistis deficito, estis 1952 ĝis 1954. Tamen, se oni konsideras, ke laŭ la tiutempa kontofarado la parto de la kongresa gajno apartenanta al U.E.A., eniradis en la ĝeneralan kason, ankaŭ en tiuj jaroj la deficito estis 127, 288 kaj 206 anglaj pundoj, dum la deficitaj jaroj estis en la realo pli altaj per la sumo de la kongresa enspezo por la respektiva jaro.

En la periodo inter la du militoj, kiam la kontoj estis farataj en svisaj frankoj, same tiel la deficitaj jaroj estis konsiderindaj. Laŭ la Jarlibro de U.E.A. el la jaro 1933, la netaj perdoj inter la jaro 1920 kaj 1932 inkluzive estis ronde en svisaj frankoj: 22.290, 31.116, 19.185, 5.601, 6.903, 3.705, 14.223, 5.787, 3.273, 2.466, 3.542. La "krudaj perdoj" estis konsiderinde pli altaj kaj eĉ en la solaj du jaroj, kiam ne estis neta perdo, la "krudaj perdoj" estis 7.600 kaj 13.000 svisaj frankoj (jaroj 1927 kaj 1928).

En 1956 kaj 1957 la spezkontoj de U.E.A. montras ronde deficiton de 5.155 kaj 760 nederlandaj guldenoj. La deficito de 5.155 estis ĉefe kaŭzita de la kostoj ligitaj al translokiĝo, dum en 1957 la deficito estis tute malgranda. Estas necese menci, ke nun la licencpago de la kongreso kaj la parto de eventuala gajno apartenanta al U.E.A. ne iras en la ĝeneralan kason kaj sekve ne formas eron de la enspezoj en la kontoj, sed tiuj sumoj eniras en specialan propagandan konton, kiu estas uzata por la celo de monda informado pri Esperanto.

En 1958, fine, la deficito estis evitita. Tiu rezulto estas pli ol kontentiga kaj ĝi certe ĝojigos ne nur la Komitaton kaj la tutan membraron de U.E.A., sed ankaŭ ĉiun sinceran esperantiston, kiu aprezas la agadon de U.E.A. eĉ se li ne estas ankoraŭ ĝia membro. Tiu fakto eĉ espereble instigos lin aŭ ŝin aliĝi senprokraste al la Asocio por tiamaniere helpi al altigo de la nombro de membroj kaj al ĝia ĝenerala fortikiĝo en la Jubilea Zamenhof-Jaro.

Tamen, ĉu tio signifas ke la financa problemo estas efektive solvita? Bedaŭrinde la respondo devas esti negativa.

La bona financa rezulto de la jaro 1958 estas ŝuldata unuavice al la fakto, ke U.E.A. havas minimuman nombron da geoficistoj, kiuj ĝis maksimumo streĉas siajn fortojn kaj ĉiutage laboras libervole dum pluraj horoj, ne malofte ĝis noktomezo, sen ia ajn plia kompenso. Se oni konsideras, ke por administrado de pli ol 27.000 membroj U.E.A. havas en sia C.O., krom la direktorino, nur du tuttagajn kaj tri duontagajn geoficistojn, oni komprenos la intensecon de ilia laboro. Sed tiu stato ne povas daŭri senfine! Plue, la sendeficita spezkonto por 1958 estas kaŭzita ankaŭ de la fakto, ke pluraj estraranoj, komisiitoj, kunlaborantoj en diversaj aktivecoj plenumas senpage tre gravajn taskojn, kiuj postulas ne kelkajn horojn da laboro monate aŭ semajne, sed plurajn horojn ĉiutage dum la tuta jaro. Fine, estas necese diri, ke kelkaj estraranoj ne prenis siajn vojaĝkostojn por oficialaj vojaĝoj, je kio ili rajtas laŭ la Statuto, kaj tio signifas, alivorte, efektivan donacon al la kaso de U.E.A. Nur pro tiuj faktoj la deficito estis evitita. Kaj tio montras, ke la financa problemo restas aktuala, se oni volas — kaj ŝajnas, ke absolute ĉiu tion volas — ke la kapitalo kaj diversaj fondadoj estu uzataj por ankoraŭ pli intensigi la agadon de la Asocio sur diversaj kampoj.

BELARTA KONKURSO

Nia literaturo maturiĝas rapide. Pli kaj pli ni vidas la fruktojn post tiu kvazaŭ mirakla semado de la Buda-peŝta skolo. Jam nia literaturo havas historion. Jam niaj verkistoj pli kaj pli laboras laŭ profesiecaj kriterioj kaj atendas recenzojn laŭ similaj kriterioj. Vere individuaj stiloj jam ekzistas. Konscia artismo jam sekvis la nuran havigadon de legmaterialo.

Kelkfoje la granda esperantista publiko ja lamas malantaŭ la artistoj — same kiel ĉiuj publikoj malantaŭ siaj plej grandaj artistoj. Kiom da esperantistoj jam hodiaŭ kapablas taŭge taksii William Auld aŭ Kolomanon Kalocsay?

Sed U.E.A., estante kvazaŭ la organiza enkarniĝo de la unuiginta, inderebema kaj serioza esperantista publiko, jam iĝis patrono de nia literaturo, per la ĉiujaraj Belartaj Konkursoj. Kiam oni konsideras la junecon de nia literaturo, la ankoraŭ venkatan indiferecon de multaj, la etecon de niaj materiaj rimedoj, oni devas konfesi, ke la fenomeno estas priferinda: nia centra oficiala organizo jam, kvankam malgrandskale, rekompencas verkistojn, instigas verkadon kaj oficiale pensigas pri artismaj kriterioj.

La verkistoj ŝuldas dankon al U.E.A. pro tiu ĉi kultura sinteno. Tamen, paradokse, ne la verkistoj ĉefe ŝuldas tian dankon. Aŭtentika verkisto verkas ĉar li devas verki; interna fajro ordonas al li ke li kreu, eĉ se legantaro tute mankas. Ne la verkistoj, sed la publiko, plej bezonas kuraĝigon. Esperantista verkisto ne sentas la tenton dubi pri la kulturaj ebloj de nia lingvo: li jam scias intime, ke la limoj de nia lingvo estas nur la limoj de liaj propraj artismaj kapabloj.

Sed por la granda esperantista publiko, kaj por la ekstera publiko, la ĉiujara Belarta Konkurso estas digna manifestado pri la senlimaj kulturaj ebloj de nia lingvo, nerefutebla rebato kontraŭ blinkenbergcaj blinduloj, ĉiujara reaserto de la objektivaj meritoj de nia muzikoplena, plastika, trafje konciza, riĉe evolukapabla lingvo.

MARJORIE BOULTON

Por solvi la problemon ekzistas efektive nur du eblecoj: aŭ konsiderinde malgrandigi la agadon de la Asocio kaj, rezulte, haltigi ĝian prosperon kaj eĉ endanĝerigi la ĝis nun atingitajn rezultojn (kion, kompreneble, neniu deziras), aŭ altigi la enspezojn. Kaj altigi la enspezojn oni povas aŭ per almenaŭ 50%-ta altigo de la kotizoj, kio signifus partan perdon de la membraro, aŭ per vere grandskala kreskigo de la nombro de individuaj membroj laŭ la nunaj kotizoj kun samtempa apelacio al la tuta pli bonstata membraro altigi sian membrokategorion al M.S. kaj, laŭ la ebleco, ankaŭ abunde donaci aŭ testamenti al U.E.A. por specialaj celoj kaj aktivecoj. Evidente, la plej taŭga, la plej konvena kaj la plej esperantista solvo estas tiu lasta. Do, ĉiu esperantisto faru sian eblon por havigi al la Asocio multajn novajn individuajn membrojn, precipe membro-abonantojn kaj membrosubtenantojn. Montru tiucele la grandegan Jarlibron de U.E.A. 1959, la ampleksan oficialan organon de la Asocio, ĝiajn diversajn eldonaĵojn kaj eksplikoj almenaŭ kelkajn el la multaj laboroj, kiujn plenumas U.E.A. en la intereso de la Internacia Lingvo kaj de ĝia plua disvastigo tra la mondo. Komprenigu al ĉiu, ke U.E.A. devas atingi en la Zamenhof-Jaro almenaŭ 10.000 individuajn membrojn kaj almenaŭ 30.000 membrojn entute, se ni volas, ke ĝi komencu la novan etapon, tuj post la Zamenhof-Jaro, sufiĉe forta nombre kaj finance por sukcese plenumi la taskojn, kiuj tiam altrudiĝos.

D-ro Ivo Lapenna

SPERTO — NE PROKRASTU

En decembro 1958 mi verkis du artikolojn por la plej gravaj gazetoj en Hispanujo, praviĝe ke en 1959 estiĝos la centjaro de la naskiĝo de Zamenhof. Ambaŭ ties Direktoroj respondis bedaŭre ke tro da materialo eĉ antaŭvidata malebligis publikigon de miaj verkaĵoj. Post decembro, ne plu estis aktuala mia temo. Nekontesteble ili pravis rezigni aperigon de miaj skribaĵoj.

Ne atendu la lastan monaton ĉi-jaran, pro la fakto ke ĝi estas datrevena de la naskiĝo, por publikigo de honorigaj artikoloj en ĵurnaloj kaj revuoj, pri nia granda pioniro kaj nia grava afero. La tuta jaro estas aktuala, datrevena. Efektive, decembro estas monato kun multaj aferoj ĵarfinaj, kaj tuj poste ne plu estos tempo por nia aktualajo. Niaj propraj Esperantaj gazetoj ofte bezonas monatojn, foje eĉ jarojn, por kelkaj publikigaĵoj. Agu tuj, sendu tuj viajn kontribuojn pri nia lingvo kaj ĝia aŭtoro dum la aktuala tempo, dum la naskjaro de Zamenhof — Ĵurnaloj, revuoj devas aperi aktualecaj. Ne prokrastu vian kontribuon al universala aktualigo de nia movado.

Prof. Delfi Dalmaŭ

LA MAGNETOFONA SERVO DE UEA

La programkolekto de la Magnetofona Servo de UEA en la lasta tempo konsiderinde pliriĉiĝis pro ricevo de programoj de Radio Zagreb kaj de surbendigoj faritaj dum la 43-a UK. Per magnetofonaj sonbendoj esperantistoj ĉie en la mondo nun povas almenaŭ orele ĉeesti la ĉefajn arandojn dum la lasta UK (pli ol 16 horoj estis surbendigitaj), ili povas aŭdi ĉiujn prelegojn dum la ISU 1958, kaj ili — je konvena horo — povas ripete ĝui interesajn kaj altnivelajn elsendojn de Radio Zagreb.

Sed por ke tiu kolekto povu konstante kreski, estas necese, ke la esperantistaro nun vaste utiligu tiun servon. Mi devis aĉeti grandan stokon da sonbendoj, havis multajn aliajn elspezojn por la servo, sed ankoraŭ ne ricevis mendojn por kopioj de tiuj sonbendoj en kontentiga kvanto. Tial la servo nun havas konsiderindan deficiton, kiun mi pagis el propra poŝo. Por forigi la deficiton mi ne volas peti subvencion, sed mi alvokas ĉiujn klubojn kaj individuajn esperantistojn, ke ili aĉetu kopiojn de tiuj programoj, kiujn ili ŝatus aŭdi. Ĉiu mendanto pagu \$ 1.00 por 30-minuta kopio. La sonbendmaterialon mi povas liveri je pli malgrandaj prezoj ol ili estas haveblaj en preskaŭ ĉiuj landoj escepte de Usono: Bobeno kun 360 metroj da sonbendo mi liveras por \$ 2.90. (Sur tiun bendon mi povas kopii 2 horojn da programoj ĉe rapideco 9 cm/sek kaj duvoja uzo.) 180-metra bobeno kostas \$ 1.85.

Duhora programo, libere elektita el la 61 programeroj de la ĵus eldonita listo n-ro 3, do kostas: \$ 2.90 + \$ 4.00 = \$ 6.90.

Sed ankaŭ kluboj kaj personoj, kiuj povas nek ĝiri monon al Kanado, nek pagi ĝin al miaj perantoj, povas utiligi la Magnetofonan Servon: Ili nur registru interesan programon kaj sendu ĝin al la Magnetofona Servo. Por ĉiu programo, kiu estas enhance, lingve kaj teknike tiel bone, ke mi povas enigi ĝin en la kolekton de UEA, oni rajtas rekompence elekti programojn ĝis la duobla longo

de la ensendita kaj akceptita programo. La kopiojn mi faros sur sonbendon de la sama longo kiel la ensendita sonbendo. Oni sendu do sufiĉe longan sonbendon.

En la ĝisnuna programaro ankoraŭ ege mankas kantoj, teatraĵoj, amuzaj rakontetoj. Bonvolu prefere sendi tian materialon. Talentaj personoj, kiuj povas instrui kantojn, mankas en multaj kluboj. Surbendigitaj kantoj povus instrui korektan kantadon. Oni surbendigu kantojn el modernaj, nun haveblaj kantararoj. Ĉe aliaj kantoj oni sendu la tekstojn, por ke mi povu presi ilin. Tre valoraj kaj interesaj povus esti lumbildparoladoj pri vidindaĵoj de urboj aŭ landoj. La lumbildoj kun klarigantaj paroloj povus cirkuli inter la kluboj, kiuj faris tiajn kontribuojn. Aliaj programoj bezonataj estas efikaj informparoladoj nacilingvaj pri Esperanto, nia movado kaj la vivo de Zamenhof. (Rekomendinda estas la unuhora anglalingva programo de David MacGill "Ludovic Zamenhof" laŭ la libro "Vivo de Zamenhof de E. Privat.) Jen sufiĉe da taskoj por niaj kluboj kaj izoluloj.

Kelkaj landaj asocioj nun jam fondis proprajn magnetofonajn centrojn. Mi bonvenigas tion, ĉar ĝi faciligas la akiron de programoj: Oni povas ricevi la sonbendojn pli rapide, oni ŝparas afrankkostojn kaj ne plu estas necese ĝiri monon eksterlanden. Sed same kiel ni bezonas tutmondan asocion kiel UEA, ni bezonas krom la naciaj magnetofonaj centroj, internacian centron, kiu kolektas ĉiujn programojn, por ke ili estu haveblaj por kluboj ĉie en la mondo. Mi do petas la komisiitojn de la landaj asocioj, ke ili sendu al mi siajn programojn, kiujn mi laŭdezire resendos aŭ rekompencos per aliaj kopioj. Krome la landaj asocioj aĉetu sonbendojn de la Magnetofona Servo de UEA, kiujn ili kontraŭ pago povas ludoni al iliaj kluboj. Jen nova tasko por landaj asocioj, kiu povus grave kontribui al la vigligo de la Esperantomovado en la koncerna lando.

Rüdiger Eichholz

Komisiito de UEA pri la Magnetofona Servo
Esperanto Press, Oakville, Ont., Kanado.

La plej juna literaturo en la mondo (*)

Kiam naskiĝas literaturo? Kiel ĝi naskiĝas? Ni konas la respondojn; kaj nenion novan mi diras atentigante, ke literaturo naskiĝas kiam juna lingvo, eliranta el la stadio de dialekto parolata de primitiv-civiliza popolo kaj ankoraŭ varianta laŭ vilaĝoj, aŭ regionoj, aŭ popol-tavoloj, estas jam tiel disvastigita, ke multaj homoj povas kompreni ĝin, kaj kiam tiuj homoj kontaktas kun aliaj pli progresintaj civilizoj, jam konantaj literaturan verk-eblecon. Tiel, la plimulto de antikvaj kaj modernaj literaturoj naskiĝas kiel popol-esprimo nuancata per diverseco de dialektoj; tuj poste tiu sincera esprimo lasas lokon por pli kleraj formoj, kaj aperas imita, ne el koro sed el cerbo, literaturo, floranta en kulturaj rondoj. Fine, la juna lingvo akiras sendependon, kaj ĝia literaturo iĝas nova konkero de homa penso.

Tian disvolviĝon de literatura fenomeno ni vidas ĉe la greka, ĉe la latina lingvoj, kaj ankoraŭ pli klare ĉe la modernaj idiomoj. Nur unu prezentas ian diversecon, ian deflankiĝon el la tri stadioj: popola — imita — krea. Ĝi estas la plej juna literaturo en la mondo, kaj, kiel ĉiuj plej modernaj aktivecoj, ĝia evoluo el nenio ĝis literatura digneco okazis en rapidega tempo: sepdek jaroj. Temas pri literaturo de l'Internacia Lingvo.

Tiu ĉi lingvo, kies bela nomo, Esperanto, ŝajnas promeso de bona espero al la homa raso, ne naskiĝis kiel izola fenomeno. La historio de l' serĉado de solvo por la problemo de internacia komunikado sur neŭtrala bazo ampleksas multajn jarcentojn. Sed tiu ĉi solvo ŝajnas nun atingita per tiu ĉi moderna, praktike jam funkcianta kaj vaste uzata ilo, kiun ellaboris pola sciencisto, d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof, kies naskiĝan datrevenon oni festas en tiu ĉi jaro. Jam en multaj kongresoj internaciaj, la lingvo Esperanto anstataŭas la koston kaj netaŭgan sistemon de samtempa traduko, kaj okazadas kongresoj kie ĝi estas la sola oficiala lingvo. Ne mirinde, ke per ĝi (kiu ne estas seka kodekso, sed vera, belsona, fleksebla lingvo) la homoj esprimis kaj esprimas ne nur sciencajn konceptojn, sed ankaŭ siajn sentojn. Do, nova literaturo naskiĝis. Kiel dirite, ĝia daŭro ne ampleksas pli ol la homa vivo-daŭro, ĝis hodiaŭ. El ĝiaj iniciatintoj, ankoraŭ certa nombro vivas kaj produktas. La diferenco inter ĝi kaj la aliaj pli malnovaj literaturoj kuŝas en la fakto, ke ĝian naskiĝon ĉestis ne popolo malklera (kiel ĉe, ekzemple, latina aŭ itala aŭ germana...), kaj ne eĉ moderna, jam kulturita, perfekte civiliza popolo (kiel ĉe, ekzemple, norvega literaturo): sed nur

unu homo, la kreinto mem de la lingvo. Nuntempaj disvastiĝ-rimedoj kaj kritiko mallongigis la spert-periodon; sed, krom la aludita diferenco, ĝiaj komenco-formoj entute similas la formojn de aliaj literaturoj; nur, ne popolo, sed unuopa individuo estas la komencinto.

Kiel aspektas la unuaj provoj de nova literaturo? Oni scias, ke ĝenerale temas pri rigida, malriĉa, malfacile komprenebla duopo, kvaropo da versoj. Ni memoru la italan "*Li mile cento trentacenque nato / fo questo tempio a San Zorgio donato / da Guilelmo ciptadin per so onore / e na fo l'opra Nicolao sculptore*", aŭ la germanan kanton de Hildebrando "*Welaga nu, waltant got, wewurt skihit!*" Ankaŭ Esperanto prezentas tiujn kvar versetojn, en praformo, kiel ĉiuj sinrespektaj literaturoj. Unua formo de projekto pri ĝi, farita de la juna Zamenhof, donis ĉi tiun "floron": "*Malamikete de las nacjes, /kaddò, kaddò, jam temp' està! / La tot'homoze in familje / Konunigare se debà*". Kio, en nuna Esperanto, sonoras: "Malamikeco de la nacioj, / falu, falu, jam temp' estas! / La tuta homaro en familio / kunigi sin devos".

Ĉu rideti pri tiu "mezepoka Esperanto"? Sed ni haltu momenton por konsideri kun kia kortuŝo, kun kia anim-tremo la juna Zamenhof surpaperigis, la 5-an de decembro 1878 (naŭ jarojn antaŭ la prezento al la publiko, en sia difinita formo nuna, de la Internacia Lingvo), tiujn versetojn. Kaj, en tiu kvarversaĵo, li enfermis la temon preskaŭ ekskluzivan de sia posta poezio; ni diru plie, de sia tuta agado, de unika celo kaj strebo de sia vivo. Kunigi la homaron! Ne temas nur pri lingvo. Ne temas pri literaturo. Ne temas eĉ pri politika programo. Lia intelekto ne kreis filozofion; ni prefere emus diri, ke lia animo formis al si religion, ĉar liajn impulsojn karakterizis fido kaj memofero, varmo kaj transcendenco super ĉiuj ebloj kaj materiaj spertoj kaj situacioj: la necesaj ecoj de religio. Kaj esence religia, arda kaj sindona estis la animo de la kreinto de nova lingvo kaj de nova literaturo. Li ne estis granda poeto — tion rekonas nuntempa kritikistaro esperantista —, sed la grandaj poetoj ne troviĝas ĉe l'unuaj provoj de novaj literaturoj. Necesas, ke estiĝu homo, kiu kuraĝos riski sian gloron, sian aktivecon kaj sian personecon sur tiun malfortan ludkarton kiu estis, ankoraŭ kvardekon da jaroj antaŭ nun, la lingvo Esperanto.

Tiu homo aperis, kaj li estas la hungara verkisto: Kálmán Kalocsay. Per li komenciĝas nova

periodo en tiu ĉi juna literaturo. Ni rajtas paroli pri "periodoj" ĉar, kiel mi klarigis, la evoluo de la Esperanta literaturo enradikiĝinta en grundo de nia plej moderna tempo, estis komplete, kvankam rapidega, kaj ĉar jam oni proponis dividon de tiu ĉi evoluo flanke de esperantista skota poeto kaj kritikisto, W. Auld (enkonduko al "Esperanta Antologio", La Laguna 1958, eld. Stafeto), kun aparta alrigardo al poezio, en "primitiva romantismo", "polurita romantismo" (ja per Kalocsay malfermita), "metafizika periodo". La poetoj de primitiva romantismo, kiel Grabowski, Devjatnin, Schulhof, la juna Privat, Miĥalski....., eldiris simplajn sentojn per simplaj formoj kaj imitis el siaj propraj naciaj literaturaj; Kalocsay, krom prilaborado de tuta metrika sistemaro, frontis novajn altegajn temojn, kaj fariĝis eterna voĉo de l' homo eta antaŭ la ĉielo kaj "la tragika muteco de l' ŝtonoj" (jen ekzemplo de verso en kiu resumigas momento de la homa penso, tiel ke, tradukata en iun ajn lingvon, ĝi ne perdas sian statuan belecon: "*das trägische Steinenschweig*", aŭ "*le tragique silence des pierres*", aŭ "*il tragico mutismo delle pietre*").

La prozistoj de primitiva periodo estis plejofte tradukistoj: kia pli streĉa imito ol traduko? La romanistoj ne tre multe valoras: Vallienne, Bein... Sed, dum la dua, "polurita" periodo, jen ĉe Kalocsay aperas valora prozisto, kiu ankaŭ estis, kaj estas, poeto: Julio Baghy, hungara artisto. Ambaŭ transpasis la duan periodon, kaj ankoraŭ verkas: ĉiam plialtiĝas la poezio de Kalocsay, ĉiam ampleksiĝas la produktado de Baghy, kiu, lastatempe, provis doni al Esperanta literaturo poezian dramon ombrantan la eternan tragedion de la homaro, de Adamo kaj Eva ĝis nun kaj post nun ("*Sonĝe sub pomarbo*", eld. Stafeto. La Laguna 1958). Kaj humoristo ne mankas, kun franca vervo

kiu fariĝis stilo: Raymond Schwartz, fondinto de humora revuo kaj mem romanisto kaj novelisto tre fekunda.

Sed kompletan dignecon de plene floranta literaturo akiris la esperantista literaturo nur post la dua mondmilito. Apud la aluditaj nomoj, troviĝas, plej ofte grupiĝintaj en skoloj, novaj poetoj kaj prozistoj. Al la hungara skolo, ankaŭ pro eksteraj politikaj kaŭzoj, substituas sin la skota skolo (Dinwoodie, Francis, Rossetti, Foote). Kaj du aliaj elstaraj talentoj, pri kiuj oni povas diri, ke ili apartenas ne al tiu ĉi juna literaturo, kies kronikon ni estas skizantaj, sed al la monda historio de la homa penso kaj arto, montriĝis kaj daŭre produktas: William Auld kaj Marjorie Boulton. Ĉi lasta estas virino, kaj inter la poetinoj de ĉiuj literaturoj mi persone ne trovas facile verkistinon, kiu povus esti komparata al M. Boulton.

Provo de vicleco kaj de valoro de la Esperanta literaturo estas la fakto, ke jam el ĝi oni komencis traduki en naciajn lingvojn kelkajn produktaĵojn: tiel, la plej juna filino de la homa penso kaj koro arigas flanke de la pli aĝaj, pli ampleksaj fratinoj. Kaj ni asertas, ke valoras la penon fordoni la dekdekdu horojn, kiujn postulas la lernado de la Internacia Lingvo por havi la eblecon proksimiĝi al tiu ĉi eta, sed valora trezoro.

D-rino Clelia Conterno Guglielminetti
(Torino, Italujo)

(*) S-ino Clelia Conterno-Guglielminetti estas doktorino kaj profesorino pri beletristiko, laŭ la okupo mezlerneja instruistino de la itala, latina kaj greka lingvoj; verkistino kaj poetino, kies poemoj en la itala kaj en Esperanto estis premiitaj; kunlaborantino de CED ekde ĝia fondiĝo en 1952. La artikolo de s-ino Conterno-Guglielminetti apartenas al la serio de studoj kaj artikoloj, kiujn verkis la kunlaborantoj de CED okaze de la Zamenhof-Jaro. La landaj informaj fakoj estas petataj traduki ĝin kaj aperigi en la nacilingvaj literaturaj revuoj.

GRANDA NOMBRO DA ARTIKOLOJ OKAZE DE LA ZAMENHOF-JARO

El pluraj landoj alvenis en la Centran Oficejon de U.E.A. aŭ en la oficejon de CED pliaj artikoloj aŭ informoj, publikigitaj en la nacilingvaj gazetoj aŭ revuoj okaze de la Zamenhof-Jaro. Ilia nombro nun jam estas tiel granda, ke ne plu eblas menciigi la unuopajn gazetojn aŭ revuojn, en kiuj ili aperis. Bedaŭrinde pluraj sendintoj ne atentis la peton indiki sur la eltranĉaĵo la lokon kaj lingvon de la periodaĵo. Kvankam en la oficejo de CED oni scias plurajn naciajn lingvojn, tamen oni ne scias ĉiujn! Kiel anoncote pli frue, en Varsovio dum la U.K. okazos, interalie, ekspozicio de ĉiuj artikoloj, studoj kaj informoj, publikigitaj en kiu ajn lingvo okaze de la Zamenhof-Jaro. Tial la landaj asocioj, landaj informaj fakoj kaj kunlaborantoj en regionoj sen organizita movado estas ankoraŭfoje petataj sendi al la adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando, aŭ al CED aŭ al la Centra Oficejo de U.E.A. artikolojn, informojn aŭ alian materialon, kiuj aperis en gazetoj kaj revuoj okaze de la Zamenhof-Jaro. Ekv. ne sendi la tutan gazeton aŭ revuon, sed nur la koncernan artikolon kun jenaj indikoj, skribitaj per presliteroj: 1. nomo de la gazeto aŭ revuo, dato, numero, loko de apero kaj lando; 2. Esperantlingva traduko de la titolo; 3. indiko de la lingvo.

La landaj informaj fakoj, la membroj de la IOK kaj la kunlaborantoj de CED estas petataj publikigi en la naciaj lingvoj la diversajn artikolojn kaj studojn, kiujn sendas al ili la I.F. de U.E.A. Grandegan helpon tiurilate povas doni la membroj de TEJA, kiuj regule ricevas ĉiujn cirkulerojn, artikolojn kaj informojn okaze de la Zamenhof-Jaro.

ROLO DE GEINSTRUISTOJ

Unu el la tre taŭgaj formoj por prezenti la personecon de D-ro L. L. Zamenhof kaj diskonigi lian verkon, estas prelegoj, precipe en la universitatoj kaj lernejoj. Neniu troviĝas en pli bona pozicio por efektiviĝi tiun taskon ol la geinstruistoj-esperantistoj. Kompare kun la aliaj profesioj, la instruista estas bonege reprezentita en la Esperanto-Movado. Ĉiu instruisto aŭ instruistino, kiu parolas la Internacian Lingvon, devus fari almenaŭ unu prelegon pri Zamenhof en sia propra lernejo kaj, laŭ la ebleco, ankaŭ en la aliaj lernejoj en sia urbo. Taŭga bazo por tiaj prelegoj estas la studo de Prof. G. Waringhien sub la titolo "D-ro L. L. Zamenhof", eldonita de CED sub la signo CED/6-1. La studo estas havigebla de la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C. Nederlando, kontraŭ 3 respondkuponoj. Por tiuj, kiuj ne povas sendi respondkuponojn, ĝi estas senpaga.

(daŭrigo p. 106)

Rememoroj pri la lastaj jaroj de mia patro

En Aŭgusto 1914 devis okazi la X-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo. Mia patro kune kun la patrino forveturis al la Kongreso, kvankam oni jam ĉie parolis kaj skribis pri la minacanta milito. Sed tamen ĝenerale oni ne tro kredis, ke la milito efektive povas okazi kaj certe neniu supozis, ke ĝi estos tiel serioza kaj longa. Miaj gepatroj veturis tra Germanujo kaj ili ĵus alvenis al Köln, kiam ili eksciis, ke la milito estis deklarita inter Germanujo kaj Rusujo. Oni anoncis al ili, ke ili devas tuj forlasi Germanujon kiel civitanoj de malamika lando, ĉar Varsovio ja apartenis en tiu tempo al la rusa registaro. Mia patro estis tamen tiel sugestiita per la penso pri la internacia paca kunveno en Parizo, ke li eĉ hezitis, ĉu li devas nepre reveni Varsovion, aŭ daŭrigi la vojaĝon al Parizo. Li supozis, ke la kongreso malgraŭ ĉio okazos en paco, kaj, post la kongreso, la milito jam certe estos finita. Sed jam li rimarkis strangan ŝanĝon ĉe la oficistoj kaj kunvojaĝantoj, kaj baldaŭ komprenis, ke la pacaj interrilatoj inter la homoj povas facile kaj rapide malaperi, kiam oni publike anoncas, ke civitano de iu lando aŭ homo de alia gento estas malamiko.

Do, laŭ konsilo de kelkaj germanaj amikoj esperantistaj, miaj gepatroj decidis reveni hejmen, kvankam la vojaĝo jam ne povis okazi per normala vojo kaj ili devis esti preskaŭ forpelitaj en iun neŭtralan landon. Estis do granda ĉirkaŭira vojaĝo tra Svedujo, en amaso da multaj aliaj, depost hieraŭ "malamikaj" fremduloj, kiuj multnombre troviĝis en tiu ĉi tempo en diversaj germanaj kuraclokoj. Tiu ĉi vojaĝo ne nur estis tre laciga kaj malagrabra por mia patro pro ne tro forta stato de lia sano, sed precipe pro la fortega morala bato, kiun li kvazaŭ ricevis, vidante la subite aperintan malamon inter la homoj, al kiuj li predikis la fratecon. Kaj baldaŭ anstataŭ la internacia paca kongreso ekregis en Eŭropo internacia milito.

Li revenis hejmen kun koro rompita ne nur en sencu simbola. La grava kormalsano komenciĝis efektive en tiu ĉi malgaja epoko. Malgaja li rekomencis sian ĉiutagan laboron en Varsovio, ĉiam pli malgaja, kiam li vidis, ke la milito fariĝas ĉiam pli kruela kaj la espero pri baldaŭa fino estas pli kaj pli malcerta.

Kiel juna kuracisto mi jam helpadis al mia patro en lia medicina laboro. Li intencis nur iom post iom enkonduki min en sian kuracistan praktikon kaj tute ne supozis, ke tio okazos subite. Kaj jen la 22-an de novembro 1914, dum la nokto, la patrino vekis min kaj, terure timigita, vokis al la patro, kiu sidis sur la lito kun vizaĝo pala kiel papero. La unuan fojon en mia vivo mi aŭdis la patron ĝemi. Li suferis pro fortega doloro de koro. Mi tuj decidis telefoni al iu sperta kuracisto inter la kolegoj kaj amikoj de mia patro, sed li energie malpermesis al mi tion fari, dirante, ke li ja mem estas kuracisto, kiu scias tre bone, ke la atako baldaŭ pasos, kaj li ne volas maltrankviligi kolegojn dum la nokto sen vera bezono. Tamen la doloro daŭris kaj mi, malgraŭ la malpermeso, venigis unu el amikoj de la patro, doktoron Kunig, faman specialiston de kormalsanoj. Kiam li alvenis, la patro jam fartis pli bone kaj forte riproĉis min pro mia malobeo. Tamen montrigis, ke la stato de la koro estis tre grava kaj la patro estis devigita resti en la lito kelkajn tagojn. Mi dume anstataŭis la patron en lia kabineto por malriĉaj pacientoj, kiuj ĝis tiam grandamase vizitadis lin por demandi konsilon kaj kuracon kaj de tiu momento mi ne plu allasis lin al tiu vere laciga matenlaboro. Depost tiam li havis matenojn liberajn por labori nur por Esperanto, akceptis pacientojn nur dum du horoj posttagmeze kaj nun jam ne estis devigita sidi ĝis postnoktomezo apud sia skribtablo por fari sian laboron esperantan. Sed denove, kvankam pli trankvile, li laboris dum tuta tago senripoze, preskaŭ ne elirante el la domo. Vane lia zorgema edzino preskaŭ forpeladis lin ĉiutage eksteren, por ke li

ĉerpu iom da freŝa aero, movigu la kruerojn kaj ventumu la cerbon. Ne ekzistis interesaj lokoj por promeno en la ĉirkaŭaĵo de la strato Dzika, en la malriĉa, sed plena de bruo kaj movado ĵuda kvartalo. Oni devis veturi malproksimen per tramo aŭ droŝko, por serĉi iom da verdaĵo kaj pura aero. Tial ni pensis, ke estus pli bone por la patro, se li loĝus ie apud ĝardeno, ĉar li certe pli volonte farus almenaŭ malgrandajn promenojn, kiuj ripozigus lin kaj bone influus la staton de lia sano. En julio de la jaro 1915 miaj gepatroj transloĝiĝis en la straton Królewska, apud la centra urba ĝardeno. Tie ĉi la kondiĉoj por trankvila laboro estis vere bonaj, des pli, ke la patro povis pli facile forgesi la fakton, ke li ne plu estis kapabla al tiel laciga laboro, al kiu li estis alkitimigita en la malnova loĝejo. Nur malmultaj pacientoj estis allasitaj al lia kuracista kabineto kaj ili ne forrabis al li la tempon, kiun li pli volonte uzis por sia kara ideo.

Li ofte diradis ke li estus feliĉa, se li povus labori la reston de sia vivo nur por kaj per Esperanto. Li tamen neniam bedaŭris, ke li rezignis de ĉiuj personaj rajtoj koncerne la lingvon mem, sed li esperis, ke eble per sia laboro kiel verkisto kaj tradukisto li povos gajni sufiĉe por la ĉiutaga pano.

La programo de lia tago estis tre precize ellaborita. Ĉiutage dum kelkaj horoj li tradukis en Esperanton la plej gravajn verkojn de la tutmonda literaturo. Estis lia intenco eldoni grandan klasikan bibliotekon, enhavantan kelkajn paralelajn fakojn. Li supozis, ke la fako literatura povos certigi al li konstantan perlaboron kaj permesos al li samtempe okupiĝi pri aliaj fakoj, destinitaj al la lingvaj esploroj, meditoj kaj rememoroj, preparoloj pri filozofiaj kaj etikaj demandoj.

La ideo de homarismo multe okupis mian patron en tiu ĉi epoko. Li revis pri fondiĝo de "neŭtrallingva kulturejo, kie la adeptoj de la pure homa etiko povus kuniĝi por diskuti pri diversaj demandoj. Dume li intencis aranĝi "akcepttagojn" por tiu ĉi celo. La simpatiuloj de la ideo kolektiĝus por amikaj interparoladoj "por ekzerci la kordon kaj spiriton".

La rompo de ĉiuj internaciaj rilatoj, kaŭzita per la milito, estis tre peniga por la aŭtoro de Esperanto, alkitimigita al la intensa interŝanĝo de ideoj kun samideanoj de la tuta mondo. Li tre suferis pro la perforta izoleco, kvankam kelkaj esperantistaj amikoj ofte lin vizitadis. Inter tiuj amikoj la plej ĝojiga estis ĉiam Grabowski, kiu en tiu tempo tradukis "Sinjoron Tadeo" de Mickiewicz kaj de tempo al tempo vizitadis mian patron, por tralegi la novajn ĉapitrojn de tiu ĉi majstra verko. Lia entuziasma deklamado de la vere belsona traduko treege interesis mian patron, ĉar en la buŝo de Grabowski Esperanto efektive vivis kaj brilis. Ankaŭ la belege konstruitaj kaj libere fluantaj paroloj de Leo Belmont faris al la patro grandan plezuron. Tre ĝoje vidita gasto estis profesoro Odo Bujwid, la universitata kolego de mia patro kaj lia granda amiko kaj fidela samideano. Kun Wiesenfeld li tre volonte diskutadis pri lingvaj demandoj. Kelkaj aliaj samideanoj de tempo al tempo forpeladis la ombron de izoleco; inter ili estis la tiama havena komandanto de Varsovio dum germana okupado, majoro Neubarth. Sed neniam mia patro ĉesis esti optimisto kaj ĝis la lasta momento de sia vivo forte kredis, ke baldaŭ la terura milito cedos la lokon al la forta kaj frata kunlaborado de ĉiuj popoloj.

En sia laboro li estis tre regula kaj sistema. Lia ĉiutaga tasko estis antaŭfiksita kaj devis esti nepre plenumita: tiom da paĝoj de traduko ĉiutage, tiom dum la monato. Mi ofte admiris la akuratecon, kun kiu la laboro estis finita laŭ la dato notita en la kalendaro je la komenco. Kaj se ekzemple tri tagoj estis fiksitaj por ĝoja ripozo post la fino de la traduko de la Biblio, la fabeloj de Andersen jam estis sur la skribtablo precize en la

kvara tago. Sed baldaŭ la kormalsano ĉiam pli ofte malhelpadis la regulan laboron ĉe la skribmasino. De tempo al tempo li devis resti kelkajn tagojn en la lito por for-tigi la koron. Sed li ne povis resti eĉ unu tagon sen laboro. Lia cerbo ne toleris ripozon. Kaj eĉ malsana, li faris notojn en malgranda poŝkalendaro, kiu ĉiam troviĝis sur la noktotablo. Kaj se foje ni singarde volis eniri en lian ĉambron, por rigardi ĉu li dormas aŭ eble ion bezonas (li neniam mem vokis iun), ni preskaŭ ĉiam vidis lin kun kraĵono en la mano. Li ĉiam meditis, notis, forstrekis, denove skribis, laŭ la devizo, ke oni ĉiam devas noti bonajn pensojn, ĉar alie oni ilin facile forgesas.

Li multe fumis, kaj la kuracistoj malpermesis al li la fumadon, pensante, ke tiamaniere oni pli bone subtenos la forton de lia koro. Li efektive ĉesadis fumi kelkajn fojojn, kaj en la kalendaro ni trovas kelkfoje la noton: "lasta fumado". Sur unu karteto ni trovas surskribon: Ne fumis 20.III. — 3.V..... 20.V. — 27.V..... 12.VII. — 25.VII. 15.VIII. — 25.VIII..... Tiuj notoj estis faritaj en la jaro 1916. Sed tiu senigo de cigaredoj estis por li vera sufero, eble ne tiom pro la kutimo mem, sed precipe pro tio, ke li tute ne povis labori sen fumado. Tio estis la sola kaŭzo, ke post kelkaj tagoj aŭ semajnoj li denove rekomencadis fumi, dirante ke li preferas vivi iom pli mallonge kaj ion krei, ol vivi longe, sed senutile. Se li tamen tiel ofte ĉesadis la fumadon, tio pruvas nur, ke la ripetaj atakoj de kordoloro estis sufiĉe gravaj.

La lastaj semajnoj de lia vivo estis por li tre malĝojaj. Li denove jam ne fumis, sed ankaŭ ne plu faris notojn en sia kalendaro, ĉar, devigita resti en lito pro grandaj suferoj, li estis tiel malfortigita, ke estis al li malfacile iom skribi. Kvankam li neniam plendis, ĉar li ne volis, ke iu alia ankaŭ suferu, kiam li suferas, tamen li aspektis tiel malĝoje kaj kompatinde, kiel neniam ĝis tiam ni lin vidis. Sed ŝajnas, ke ĝis la morto li ne tiom pensis pri si mem, kiom pri sia kara ideo, per kiu li volis feliĉigi la homaron, kaj li sentis sin vere malfeliĉa, ke pro la malsano li ne plu povis plenumi sian ĉiutagan taskon, kiu devis konduki lin al la venko.

La lastan tagon de la vivo li fartis pli bone. Sajnis al li, ke li denove povos rekomenci la laboron, kaj tiu penso bone influis lian humoron. Sed lia koro ĉesis bati, eble en la momento, kiam li pensis:

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile....

Adam Zamenhof

(Presita en "Pola Esperantisto" 1957).

(daŭrigo de p. 104)

MALLONGAJ INFORMOJ

Ŝipo "L. L. Zamenhof": Laŭ la pola radio (Esperanto-elsendo de la 25-a de aprilo), granda ŝipo, nun konstruata en Gdansk, ricevos la nomon de D-ro L. L. Zamenhof. La baptado de la nova ŝipo estos solene farita okaze de la junulara kunveno, organizita de TEJO, en Gdansk.

Du pliaj Esperanto-stratoj: La urbo Ragusa en Sicilio (Italujo) dediĉis al Esperanto straton en la nova kvartalo "Villa Pax". La strato nomiĝas "Via Esperanto". Laŭ la informo ricevita de s-ro L. Minnaja, ĉefdelegito de U.E.A. por Italujo, ankaŭ Romo havos Esperanto-straton. La komisiono pri nomado de stratoj en la komunumo de Romo unuanime akceptis la tiusenkan proponon de la Roma Esperantista Grupo. G.E.A. instigis per cirkulero de la 4-a de aprilo ĉiujn Esperanto-societojn en Germanujo entrepreni la necesajn paŝojn ĉe la lokaj aŭtoritatoj, por ke unu strato aŭ placo ricevu la nomon de Zamenhof aŭ Esperanto en la Jubilea Jaro.

Ĝis nun entute ĉ. 100 urboj en la mondo havas stratojn aŭ placojn kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto. Vidu pri tio la rubrikon de CED en tiu ĉi numero.

Broŝuro pri la Zamenhof-Jaro: Pluraj landaj asocioj nun eldonas en naciaj lingvoj la broŝuron kun la bazaj

dokumentoj pri la Zamenhof-Jaro. Ĉiuj eldonantoj estas petataj sendi 5 ekzemplerojn de tiu eldonaĵo al la sekretario de la IOK, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo, por ke li havu superrigardon pri la agado kaj povu publikigi pri tio informon.

KONKRETA REZULTO EN DELHI

En la Publika Biblioteko de Delhi, konstruita de UNESCO antaŭ kelkaj jaroj nur, ekfunkciis tute nova studrondo sub la nomo. "Esperanto Promotion Group". Tio estas la unua rezultato de miaj ĉi tieaj kursoj, kiuj konstante daŭras.

La gelernantoj bezonegas helpon por firmigi tie sian grupon, la unua lingva grupo en la biblioteko, kie troviĝas jam multaj libroj en diversaj lingvoj de Hindujo kaj, krome, nur en angla lingvo, ankorau uzata oficiale apud la hinda lingvo.

Tial mi insiste petas, ke ĉiu societo, klubo aŭ izolulo sendu librojn kaj gazetojn al la sekretario: S-ro Mahalingem, c/o S-ro Venkataraman, B-33, E Type Qs, East Vinay Nagar, New Delhi, Hindujo.

Gratuloj surprizos la prezidanton, S-ro Sabharwal, 3285 Galli Doorwalan, Bazar Mohd Ali, Mori Gate, Delhi, Hindujo. Krome ili plivigligos la novulojn, montrante al ili vian simpatian.

Varme antaŭdankas vin ĉiujn pro la rapida rezulto de via komprenemo,

M. Haudebine,
Cseh-Instruistino el Parizo.

P.S.: *Atentu!* Sur la pakajoj estu noto, se eble anglalingve, ke estas donaco valoranta, laŭ la enhavo, malpli ol 20 rupioj. (4 r. 75 : 1 dolaro).



Parto de la lernantoj en la biblioteko de malnova Delhi. Sidante: tute maldekstre, S-ro Sabharwal, prezidanto de la Esperanto-Fako en la biblioteko. Tute dekstre S-ro Mahalingem, la sekretario. La dua persono de maldekstre estas nia agema kaj energia senditino F-ino Madeleine Haudebine.

CED

Centro de Esploro
kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Anglujo
Telefona ARNold 90-81

Esperanto-Stratoj en la mondo

La p-to 13 de la Baza Programo por la Zamenhof-Jaro antaŭvidas, ke la landaj Esperanto-organizaĵoj kaj la lokaj Esperanto-societoj klopodos atingi la nomigon de unu strato aŭ placo en kiel eble plej multe da lokoj per la nomo "Zamenhof, Aŭtoro de la Internacia Lingvo Esperanto" aŭ "Esperanto". Por faciligi tiujn klopodojn CED atentigas, ke siatempe s-ro G. C. Fighiera faris enketon pri ĉiuj stratoj aŭ placoj, kiuj portas la nomon de Zamenhof aŭ Esperanto. La rezulto de tiu enketo estas publikigita en la februara numero de "Esperanto", 1957, p. 24. Laŭ la poste ricevita informoj, ankaŭ jenaj urboj aŭ malpli grandaj lokoj havas tiajn stratojn aŭ placojn: *Glinde* proksime de Hamburg, Germanujo; *Rüsselsheim* kaj *Gross-Gerau*, ambaŭ Germanujo; *Gdansk*, Pollando; *Szeget* kaj *Miskolc* ambaŭ en Hungarujo; *Ragusa*, Italujo. Bv. noti, ke la listo ne estas kompleta. La lokaj grupoj kaj la delegitoj de U.E.A. estas petataj informi senprokraste CED, se en ilia urbo troviĝas strato aŭ placo kun la nomo Zamenhof aŭ Esperanto. Oni indiku precize la nomon kaj, laŭ la ebleco, la daton, aŭ almenaŭ la jaron de la inaŭguro.

Studo de Prof. G. Waringhien

Prof. G. Waringhien, kunlaboranto de CED, verkis koncizan studon sub la titolo "Lazaro Ludoviko Zamenhof". Ĝi estas eldonita de CED en Esperanto sub la signo CED/6-1 kaj ĝi aperos en presita formo ankaŭ en pluraj naciaj lingvoj.

La studo havas jenajn mallongajn ĉapitrojn: Lia Familio, Lia Kariero, Karaktero, La Unuaj Provoj, Naskiĝo de Esperanto, Zamenhof kiel Lingvisto, Zamenhof kiel Tradukisto, Zamenhof kiel Pensulo, Zamenhof kiel Homo.

La studo tre taŭgas ankaŭ kiel bazo de artikoloj aŭ prelegoj pri la aŭtoro de la Internacia Lingvo. Ĝi estas sendita al ĉiuj landaj asocioj, komitatanoj de U.E.A., membroj de la IOK, landaj informaj fakoj. La aliaj interesiĝantoj povas ĝin ricevi kontraŭ 3 respondkuponoj nur en Esperanto de la Centra Oficejo de U.E.A., Eendrachtsweg 7, Rotterdam, C., Nederlando.

Atentigo al geinstruistoj

Ĉiuj geinstruistoj estas ankoraŭfoje atentigataj pri la du enketoj koncerne Esperanton en la lernejoj, pri kio aperis detala informo en la rubriko de CED en la aprila numero de "Esperanto" 1959. CED petas la helpon de ĉiuj geinstruistoj. Bonvolu nepre sendi viajn informojn al la adreso de s-ro David Kennedy, 21 Westfield Road, Bishop Auckland, Co. Durham, Britujo.

Donacoj por CED

	£	§	p
La stato de la 28-a de februaro 1959	29	12	10
S-ro Sven Sjoblom, Svedujo	1	14	3
S-ro N. V. Kinh, Sovetunio		7	6
N.N. en V. Nederlando		9	5
S-ro E. P. Crabtree, Britujo	2	0	0
Novzelanda Esperanto-Asocio, Novzelando	1	0	0
F-ino Winifred Addis, Aŭstralio	1	0	0
S-ro E. H. Beck, Britujo	1	0	0
La stato je la 26-a de aprilo 1959	37	4	0

Koran dankon al ĉiuj donacintoj.

Donacojn por CED oni povas sendi al la Centra Oficejo de UEA, Eendrachtsweg 7, Rotterdam C, Nederlando; al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, rue de Chabrol, Paris, 10, Francujo; al la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA aŭ al CED rekte je la nomo kaj adreso de ĝia direktoro, 77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Informoj pri Esperanto en Birmo

Mi ĵus ricevis la unuan numeron de 1959 de la plej granda anglalingva hobia-revuo "Cleopatra's Hobby Bulletin" en Oriento, la organo de la Cleopatra's Hobby Club en Ranson (Birmo), unu el la plej grandaj hobia-kluboj en la mondo. Tie aperis tutaĝa artikolo pri Esperanto sub la titolo "Interest in Esperanto language waxing".

La unua frazo de tiu ĉi artikolo estis eĉ presita en Esperanto: "Dum la pasinta semajno tiu ĉi germana urbo ĉe la Rejno estis la Esperanta Cefurbo de la Mondo".

La artikolo parolis pri D-ro L. L. Zamenhof, la esperantomovado, U.E.A., Kongreso en Mainz kaj ankaŭ pri la okazonta Kongreso en Varsovio. En la artikolo estis fragmento de la "Retoriko" en Esperanto de Prof. D-ro Ivo Lapenna. Lia brila nomo estis menciita kelkfoje.

Antaŭ la publikigo de tiu ĉi artikolo, la sekretario de C.H.C. s-ro A. N. S. Hasbullah Khan jam skribis al mi pri tio. Li mem ne estas esperantisto, sed simpatias al Esperanto. Li estas hindo-tamiliana ĵurnalisto kaj redaktoro de la Revuo. La publikigo de la artikolo estas pruvo de lia simpatio pri Esperanto. Oni povas peti lin daŭre informi pri Esperanto kaj gratuli lin. Oni ankaŭ povas membriĝi al lia Klubo. Petante lian respondon oni aldonu IRK. Oni skribu en angla lingvo al lia adreso: Cleopatra's Hobby Club. N. 243, Maung Taulay Street, Rangoon, Burma.

Tiu ĉi informo en la birma bulteno estas la unua en "La lando de la oraj pagodoj". Ĝi estas nia espero en Birmo.

Armand Su

Ne forgesu subteni la gravegan laboron de CED!



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al:
Philippe Bonnard,
119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

Atentu!

La aperendajn artikolojn por "LJV" bonvolu sendi en du ekzempleroj tajpitaj se eble. Dankon.

GDANSK ATENDAS VIN!

De la 24-a ĝis la 31-a de julio, okazos en Gdansk-Dantzig nia Internacia Junulara Kunveno. En la marta numero de "Esperanto" aperis kelkaj informoj pri tiu kongreseto de nia junulara organizo. Sed oni povas havi pliajn informojn skribante al: "Internacia Junulara Kunveno de TEJO, Garncarska 18 Gdansk, Pollando.

Por tiuj, kiuj faros la grandan vojaĝon al Varsovio, ne estas malfacile foriri unu semajnon pli frue, kaj partopreni nian kunvenon. Estas por multaj junuloj la unika okazo por viziti plurajn urbojn polajn.

Kvankam ne multaj aliĝoj alvenis ĝis nun, ni esperas ke la tutmondaj gejunuloj vekigos, kaj ke tiu kunveno estos tiel sukcesplena, kiel la antaŭa en Homburg.

Memoru la agrablan tempon pasigitan en Homburg!

Aliĝu tuj por Gdansk!

FERIOJ EN NEDERLANDO INTERNACIA JUNULARKUNVENO EN SCHEVENINGEN

La Federacia Estraro de Germana Esperanto-Junularo kore invitas la junajn geesperantistojn en- kaj eksterlandajn al Internacia Junularkunveno okazonta de la 15-a ĝis la 22-a de aŭgusto 1959 en la Internacia Junularhotelo en Scheveningen, Nederlando.

La renkontiĝo celas praktikan internacian kompreniĝon inter gejunuloj pere de Esperanto, perfektigiĝon en Esperanto per prelegoj, diskutoj kaj abunda konversacio kaj nelaste refreŝiĝon dum banado kaj ludado sur la strando de Scheveningen.

La partoprenkostoj (enhavantaj loĝadon kaj ĉiujn manĝojn) estas 55.— nederlandaj guldenoj aŭ 60.— germanaj markoj. La nombro de gepartoprenantoj estas limigita al 50, tial bonvolu baldaŭ aliĝi sciigante viajn nomon, antaŭnomon, precizan adreson, naskiĝdaton kaj profesion al la Federacia Estraro de Germana Esperanto-Junularo, T 6.18, Mannheim, Germanujo. La limdato por aliĝoj estas la 30-a de junio 1959.

La Internacia Junularhotelo estas

sub la aŭspicioj de la Nederlanda Asocio por Internacia Junularkontakto. Ĝi servas al la interamikiĝo de junaj homoj el ĉiuj nacioj kaj samtempe volas konatigi siajn gastojn kun la nederlanda vivo kaj kulturo.

La Internacia Junularhotelo situas 10 minutojn piede de la strando kaj dunoj de Scheveningen kaj 15 minutojn trame de la centro de Den Haag, la registara urbo de Nederlando.

Scheveningen, la fama internacia banloko, estas konata al la Esperantistoj ankaŭ kiel sidejo de la redakcio de "Heroldo de Esperanto", la en tutmondo multe legata kaj tre ŝatata duonmonata internacia organo de la Esperanto-movado.

S-ro Teo Jung, la redaktoro de "Heroldo", kiu kunlaboras en la organizado de la renkontiĝo, s-ro W. Ruys Jr., la direktoro de la Internacia Junularhotelo, kaj la Federacia Estraro de GEJ vokas al vi:

Koran bonvenon en Scheveningen!

4-a INTERNACIA JUNULARKUNVENO SUR FELDBERG (Nigra arbaro)

Ĉi-jare kolektiĝis 40 geamikoj el Francujo, Germanujo, Hungarujo kaj Jugoslavio en la junulargastejo Hebelhof sur Feldberg inter la 26-a kaj la 30-a de marto 1959. Iomete miris la aliaj gastoj venintaj por skii, ĉar la neĝkondiĉoj estis ankoraŭ sufiĉe bonaj. Ankaŭ inter la Esperantistoj estis skiemuloj, kiuj pro tio jam pli frue venis aŭ plilongigis la restadon. Sed oni ne pensu, ke la Feldberg-kunveno estas nur gaja aranĝo por kelkaj skiemuloj kaj migrantoj. La partoprenintoj aŭdis prelegojn pri la kulturaj kaj sociaj situacioj de la junularo en kelkaj landoj, kiujn sekvis viglaj diskutoj. Günther Becker, Prezidanto de TEJO, parolis pri la temo "Kelkaj karakterizaĵoj pri la edukado de la franca junularo". Richard Reuchlin, Prezidanto de Germana Esperanto-Junularo, la gvidanto de la kunveno, prelegis pri "La kunlaboro de la junularaj organizaĵoj en la Germana Federacia Respubliko. Kvar membroj de la Studenta Esperantista Klubo de Beograd prezentis kolektive raporton pri "La kultura kaj socia situacio en la jugoslavia studentaro". Krom la kontribuajfoj al la oficiala temo laŭ kiu la kunveno ricevis subvenciojn de la ŝtato por la partoprenkostoj kaj por parta repago de la vojaĝkostoj okazis

prelego de nia maljuna amiko Wolde-mar von der Ley pri "Tibor Sekelj en la ĝangaloj de amazonio". Lia junulargrupo el Tailfingen prezentis "Amuzan Konversacion" per skeĉoj kaj deklamoj kaj ankaŭ kontribuis al la Gaja Vespero, tiamaniere pruvante, ke la Esperanto-instruado al infanoj povas esti tre sukcesa kaj alportas al ili multe da ĝojo, kiel eĉ la aliaj gastoj en la junulargastejo povis rimarki.

Lumbildoj pri internaciaj junularkunvenoj 1958 montris, ke en tiu rilato la jaro 1958 estis sukcesa jaro por la Esperantista Junularo. Je la paska dimanĉo venis matene la "Paska Leporo" kaj donacis al la gejunuloj frandaĵo en formo de leporetoj el ĉokolado kaj de ovetoj. Dimanĉon posttagmeze okazis sufiĉe longa kaj laciga ekskurso parte tra alta neĝo unue al Schluchsee kaj poste al Bärenthal, de kie la migrantoj revenis per aŭtobusoj. Kantado kelkfoje okazis precipe dum la Gaja Vespero; pro la fakto, ke la blinda kantistino Anne-liese Haas estis inter ni, eble la neesperantistoj estis pli impresitaj ol kutime. Estas kompreneble, ke ni eluzis la kunestadon kun multaj aliaj gastoj en la junulargastejo por disdoni al ili flugfoliojn kaj por varbi ilin per personaj kontaktoj. Post la ferma kunsido lundon matene kaj la lasta komuna tagmanĝo niaj junaj geamikoj disiris por daŭrigi la laboron en la hejmlandoj sed kun la espero de revido.

Günther Becker

Geografia Semajno

Inter la 20-a kaj la 30-a de julio la Internacia Geografia Asocio organizas sian unuan **Geografian Semajnon**, kiu daŭros dek tagojn. Ĝi okazos sur pitoreska banloko de la jugoslavia marbordo, apud Rovinj, en Istrio. Dum la "semajno" okazos prelegoj (interalie prelegos Tibor Sekelj pri siaj esplorvojaĝoj), diskutoj, gajaj vesperoj, prezentado de filmoj kaj ekskursoj al diversaj interesaj lokoj, inter ili ankaŭ al la mondfamaj grotoj de Postojna. Sed restos ankoraŭ sufiĉe da tempo por ĝui la sunoplenan Adrian maron kaj ĉirkaŭvagadi la belegajn apudajn insulojn. La ĉirkaŭaĵo estas tre taŭga ankaŭ por submara ĉasado, kaj ekipo estos disponebla.

Speciala allogaĵo de la Geografia Semajno estas la malalta prezo de la tuta aranĝo. Partopreni povas ĉiuj membroj de IGA, kaj tiuj, kiuj kune kun la aliĝo al la "Semajno" aliĝos ankaŭ al IGA. Ĉiujn informojn petu de la komisiito S-ino Nedeljka Subotić, Hadži Djerina 11, Beograd, Jugoslavio.

Radio - Babiloj

(25)

La Esperantistoj havas la dissendojn, kiujn ili meritas.

Pola Radio ĉiutage dissendas duonhoran Esperanto-programon !

Ofte ni geesperantistoj plendas ĉar la Esperanto-radio-programoj daŭras nur 5, 10 aŭ 15 minutojn kaj okazas en tre nekonvenaj noktaj horoj, kiam "respektindaj homoj" dece dormas.

Radio Rio de Janeiro jam longe ĉiutage dissendas duonhoran Esperanto-programon, sed kredeble ĝi ne estas aŭdebla sur la norda duontero; almenaŭ ni neniam sukcesis kapti iun el ĝiaj ondoj. Do profitas ĝi nur al niaj gesamideanoj de la suda duontero.

Sed nun ni norduloj havas bonegan ŝancon. Krom la interesaj kaj bone aŭdeblaj programoj de Bern, Romo kaj Zagreb logas nin ekde 4/IV/1959 ankaŭ variaj programoj de la Pola Radio, ne dum la noktoj, sed ĉiuposttagmeze de la 16.30-a ĝis la 17.00-a horo (M.E.T.) per 7 mallongaj kaj 1 meza ondoj indikitaj sur paĝo 115-a de ĉi tiu numero. Ankaŭ tiu tempo havas sian malavantaĝon, precipe por homoj laborantaj posttagmeze en oficejoj, fabrikoj aŭ aliaj laborejoj, sed ni supozas, ke posttagmeza dissendo tamen konvenas al multe pli da homoj ol noktmeza.

Kiu havas sian laboron hejme, nepre funkciigu sian radio-ricevilon je la 16.30 (M.E.T.) por aŭskulti la bone prizorgatan, bele elparolatan, interesan kaj tre varian Esperanto-programon ĉiutage de la Pola Radio. Mi, kiu loĝas en Frislando, unu el la plej nordaj provincoj de Nederlando, tre klare povas aŭdi la programon per la ondo 31,50 m.

Sabatposttagmeze sonas je la sama horo "La Voĉo de la 44-a Universala Kongreso de Esperanto", ankaŭ tutan duonhoron !

Nepre aŭskultu kaj raportu pri via aŭskultado al la Pola Radio, Esperanto-fako, Varsovio (Pollando), aldona vian dankon.

Ne nur kursoj, prelegoj kaj informoj

Kvankam mi kun plezuro kaj intereso ofte aŭskultas la prelegojn kaj informojn de diversaj stacioj, mi ĝoje konstatas, ke kelkaj stacioj dissendas ankaŭ artajn aŭ distrajn programojn en Esperanto, tiel donante tre bonvenan varion.

Radio Roma unufoje monate dediĉas sian Esperanto-kvaronhoron al la kantado de popularaj italaj kanzonoj, kies tekstojn s-ro Luigi Minnaja tradukis tre lerte en Esperanton. F-ino Luciana Salvatori bele kaj klare kantas tiujn tekstojn.

Radio Zagreb dissendis 9/IV/1959 la radiodialogon "Du Generacioj", premiitan en la Belarta Konkurso de U.E.A. en 1958.

S-ino Lapenna kaj f-ino Jinko tre flue kaj belsone parolis; la lasta kortuŝe ludis sian aflikton en la fino. S-ro Mamujiĉ havis nur malgrandan rolon, sed kontentige plenumis ĝin.

Bedaŭrinde aliaj stacioj tre ĝenis per muziko.

17/IV/1959.

S. S. DE JONG

Demonstracia Kongreso („Zamenhofkongreso 1859-1959")

26.-27. de septembro 1959 en UTRECHT, Nederlando.

N.C.K.E. decidis okazigi demonstracian kongreson en la kadro de la Zamenhofa jaro sub la nomo "Zamenhofkongreso 1859-1959". La kongreso okazos je la 26a kaj 27a de septembro en Utrecht.

Administranto de la kongreso estas : S-ro G. H. Koudijs, Paulus Potterstraat 16 en Utrecht. Ĝirkonto estas 182279.

Volonte ni instigas ĉiujn Esperantistojn nepre partopreni tiun unikan kongreson por ke ĝi estu kiom eble plej impona kaj atestu pri la forto de nia Esperanto-movado !

la sekretario de N.C.K.E.
A. M. D. KORFF

Internaciaj ferioj en Besançon (Francujo)

La konata franca "Grupo de Esperantistaj Edukistoj" (GEE) organizas de la 15-a ĝis la 31-a de aŭgusto, en Besançon (Doubs) internacian someran renkonton.

La urbo estas tre pentrinda kaj agrabla. Belaj ekskursoj en la regiono estas antaŭvidataj

Informoj kaj pagoj : S-ino Trésorier, 2, rue des Lilas Besançon (Doubs), Francujo. (Poŝta ĉekkonto; Dijon 711-00).

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 30-an de aprilo

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Belgujo	1480	1782	120.40
2.	Finnlando	1935	2325	120.15
3.	Hispanujo	1999	2185	109.30
4.	Svislando	1950	1930	98.97
5.	Britujo	6093	5946	97.59
6.	Svedujo	6420	6030	93.93
7.	Francujo	7066	6218	88.—
8.	Usono	2816	2405	85.40
9.	Nederlando	5119	4315	84.29
10.	Danlando	2639	2045	77.49
11.	Italujo	3980	3045	76.51
12.	Pollando	6635	5020	75.66
13.	Germanujo	6951	4830	69.49
14.	Norvegujo	1991	1360	68.31
15.	Jugoslavio	5690	2645	46.49
16.	Brazilo	8255	2454	29.73

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2250	195.65
2.	Kanado	435	560	128.73
3.	Portugalujo	615	520	84.55
4.	Israelo	255	190	74.51
5.	Sudafriko	215	160	74.42
6.	Urugvajo	325	235	72.31
7.	Islando	270	190	70.37
8.	Novzelando	878	600	68.34
9.	Aŭstralio	1280	826	64.53
10.	Aŭstrujo	1360	810	59.56
11.	Maroko	457	201	43.98
12.	Argentino	615	210	34.15

Ĉiu larĝe pasu 100% en la Zamenhof-Jaro !

Esperanto ankoraŭ allogas la publikon

Mi aŭdis pri urbeto, kie el mil enloĝantoj kvarcent estas esperantistoj, ĉar al la gejunuloj mankas mono kaj la lernado kaj ekzercado de Esperanto en pruntita malnova lernejo provizas senpagan distron.

Sed en urboj kie estas televido, teatroj, koncertoj, dancejoj, sportejoj kaj ebleco de ĉiuspecaj flankokupoj, oni pretekstas ke la publiko ne estas deziras lerni Esperanton. Ke tiu opinio ne estas ĝusta pruvas la raporto en "Esperanto" por Aprilo pri la granda sukceso de la kurso en Hago, Nederlando, eldonata ĉiusemajne de la gazeto "Posthoorn".

Post la kunvenoj de la Estraro de U.E.A., en Rotterdam, mi vizitis en Hago mian amikon, S-ro Harry Kervers, kiu estas la organizanto de la kurso. Li klarigis ke "Posthoorn" estas anoncgazeto liverata senpage al pli ol 200,000 adresoj en Hago kaj ke ĝi enhavas, aldone al reklamoj, interesajn artikolojn. Ne estis facile por li persvadi la redakcion eldoni demandon ĉu la legantoj deziras esperantan kurson. Unue la redakcio sendis ĝin nur al unu kvartalo sed la respondo de la publiko estis tuja. Pli ol 150 favoraj leteroj alvenis la postan tagon. La redakcio konstatis, ke ili trovis veran allogaĵon kaj sendis la proponon al ĉiuj legantoj kun promeso komenci la kurson venontsemajne.

Imagu la taskon kiu frontis al S-ro Kervers: preparado por preskaŭ tuj ricevi kaj malfermi 1300 leterojn, registri la nomojn kaj adresojn de kursanoj, trovi korektantojn de ekzercadoj, sendi la taskojn al ili, rehavigi ilin, kontroli ke ĉio estas farita, kaj resendi al la kursanoj. Aldone al ĉio ĉi, li devas verki aktualan artikolon kaj novan lecionon

ĉiusemajne. Ne miru do, ke lia hejmo fariĝis kvazaŭ ĉefsidejo de granda entrepreno, kie ĉiuvespere laboras de ok ĝis dek personoj, kaj ke li mem kutimas labori de la 19-a ĝis la 2-a h. kvin vesperojn semajne.

Li havis la ideon aranĝi kontaktvesperon, kaj por tia eble granda amaso devis riski lui kaj antaŭpagi grandan salonon en kiu estis akceptita antaŭnelonge la Reĝino de Britujo. Tiun decidon kaj riskon li mem devis preni. Feliĉe, li vendis 1200 biletojn, kaj estis emociiga momento kiam Andreo Cseh paroligis la kursanojn por la unua fojo per leciono el sia mondfama rektmetoda kurso. Kuraĝe, S-ro Kervers estis aranĝinta, ke specialaj tramoj atendu je la fino de la kunveno, kaj kune hejmenirante la feliĉaj kursanoj "forte, kuraĝe kaj elegante" respondis al ies demando "Jes, ni estas kontentaj".

Unu rezulto estas, ke la reklamantoj en "Posthoorn" insistas ke la leciono aperu sur diversaj paĝoj por ke ili ĉiuj havu okazon esti apud ĝi, ĉar ĝi estas la unua afero al kiu la legantoj atentis. Kompreneble, la 1300 kiuj ensendas la leterojn, estas nur frakcio de la nombro, kiu sekvas la kurson aŭ per uzo de la korektita tasko de aliulo aŭ eĉ nefarante la hejmtaskon. La kursanoj venas el ĉiuj sociaj tavoloj kaj la hejmtaskoj post nur ses lecionoj montras mirindan progreson.

En multaj landoj ni bezonas ĝuste la stimulon, kiun donas tia gazeta kurso. Ni memoru, tamen, ke ne per longaj diskutoj en komitatkunvenoj oni atingas tian sukceson, sed per preteco, senhezite kaj senplende, daŭre kaj harmonie laboregi. Aŭ ni helpu mem aŭ lasu trankvilaj tiujn, kiuj laboras.

H. W. Holmes

POLLANDO: Zamenhofaj Memortagoj en Varsovio

La 42-a datreveno de morto de Zamenhof estis memorigata en Varsovio en tiu ĉi jaro.

La 14-an de aprilo Pola Radio en la matena kalendaro sufiĉe vaste menciis pri la kreinto de Esperanto. En la sama tago vespere je horo 20,50 la plej forta radistacio Varsovio I disaŭdigis en pola lingvo prelegon de s-ro Isaj Dratwer pri "La homo, kiu kreis la lingvon".

Esperantlingvaj disaŭdigoj de Pola Radio dediĉis plej grandan parton de la elsendo la 14-an de aprilo al la memoro de Zamenhof. La programo konsistis el la enkondukaj vortoj,

kanto de "Ho, mia kor", plenumita de s-ro Remigiusz Kosakowski kaj el fragmentoj de libro de s-ino Maria Ziółkowska "Doktoro Esperanto" en esperanta traduko de s-ro Isaj Dratwer. La tutaj estis akompanata de konforma muziko kaj faris neforgeseblan impreson. La 19-an de aprilo kolektiĝis ĉe la tombo de la Majstro varsoviaj geesperantistoj. Kvankam la Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio deziris, ke estu surmetota nur unu florkrono, tamen florkronojn surmetis la Ĉefa Estraro, UEA (s-no Fighiera), Ĉefurba Komitato por Honori la Centan Datrevenon de la Naskiĝtago de


Zamenhof, Juda Kultura Societo, Varsovia Filo de Pola Esperanto Asocio kaj florojn apartaj esperantistoj. Pri la solenaĵo raportis ĉiuj varsoviaj ĵurnaloj, radio kaj televido, kiu prezentis fragmentojn de la solenaĵo dum la televidĵurnalo la 21-an de aprilo.

Varsovio Filio de Pola Esperanto Asocio, kies nova estraro vigle kaj aktive laboras, unu el siaj klubaj vesperoj la 15-an de aprilo dediĉis al Zamenhof. Dum la vespero s-ino Ziółkowska, la aŭtorino de la libro "Doktoro Esperanto" legis fragmentojn de sia libro en pola lingvo kaj en la esperanta traduko. D.

Vokas voĉ' de Varsovi': Venu ankaŭ vi!

DE TRABA KABANO

AL LA BLANKA DOMO



Ci-jare, antaŭ 100 jaroj, naskiĝis en Eŭropo, d-ro L. L. Zamenhof, modesta homo grandanima. Simile antaŭ 150 jaroj naskiĝis en Ameriko alia modesta homo, ankaŭ kun nobla animo, fidele gismorte al siaj idealoj pri libereco kaj toleremo: Abraham Lincoln.

Lincoln naskiĝis en malriĉa arbotrunka dometo en la ŝtato Kentucky la 12-an de februaro 1809. Jam kiel knabo li devis labori kiel hardita pioniro, senarbigante kaj prilaborante la senfruktan teron. Ne estis tempo por edukado, nek mono. 21-jara li translokiĝis al la najbara ŝtato Illinois, kie li fariĝis butikisto; samtempe li diligente studis por fariĝi juristo. Poste li laboris dum deko da jaroj kiel advokato kaj legisto en la ĉefurbo de Illinois kaj baldaŭ gajnis respekton pro sia ĉiama honesteco. Fine li estis elektita reprezentanto de la Kongreso de la Unuigitaj Ŝtatoj (la supera leĝdona organo de Usono), sed ne reelektita pro sia forta kondamno de la usona-meksika milito 1846—47.

Post kelkaj jaroj de silento Lincoln nun partoprenas energian agadon kontraŭ la sklaveco de la negroj. Sklaveco ekzistis nur en la sudaj ŝtatoj de Usono, kiuj

asertis, ke aliaj unuopaj ŝtatoj aŭ la federacio mem ne rajtas sin miksi en tiun aferon, ĉar ĝi apartenas al la ekskluziva kompetenteco de la unuopaj ŝtatoj. — Lincoln jam antaŭe kiel Kongresa reprezentanto malsukcese proponis la abolicion de sklaveco: Por eviti konflikton kun la sudaj ŝtatoj kaj malebligi subitan renversigon socian kaj ekonomian, li estis proponinta laŭgradan nuligon de sklaveco kun kompenso al la sklavposedantoj, ĉar laŭleĝe kaj formale la sklavoj ja estis ilia propraĵo.

Pro sia denova agado kontraŭ sklaveco Lincoln reiris en la politikan vivon, kaj post sincera oratora kampanjo li estis elektita prezidanto de Usono en 1860 per granda plimulto. Tamen la sudaj ŝtatoj ne volis respekti la elekton kaj tial forlasis tiun unuigon, kiu ĝis tiam estis Usono, por fondi propran sudan konfederacion.

Lincoln proteste deklaris, ke estas neeble por iu ajn ŝtato sin eltiri el la Unuiĝo kaj sciigis, ke la usona registaro prizorgos, ke la federacia administrado funkciu, ĉu en la Nordo, ĉu en la Sudo. Tamen la Sudo per milita forto malebligis al la usona registaro provizi per nutraĵo siajn sudajn garnizonojn, kaj la pacama Lincoln — kiu iam perdis sian mandaton en la Usona Kongreso pro sia kuraĝa kondamno de milito — estis devigata komenci sangan internan militon.

La celo de la milito estis konservi la unuigon de la nord-amerikaj ŝtatoj kaj efektiviĝi la principon, ke en demokratio ĉiuj homoj egale devas respekti la liberan volon de la popolo. Tamen la nuligo de sklaveco estis celo neniel malpli grava, kaj per fama deklaro Lincoln liberigis ĉiujn sklavojn en Usono de post novjaro 1863.

La graveco de Lincoln dum la kruela milito estis precipe tio, ke ŝajne li sola komprenis ĝian plenan signifon. Pro sia konvinko pri la justeco de la motivoj de la Nordo li sukcesis konservi la Nordajn fortojn kaj unuecon malgraŭ komencaj malvenkoj kaj malesperoj. Poste kiam la Nordo iom post iom venkis la reziston, Lincoln devis daŭrigi la batalon, ĉar la celo de la milito povis esti ne nur venki la Sudon, sed komplete ĝin konkeri; sen tio oni ne povus restarigi kaj plifirmigi la nordamerikan unuigon. Multaj homoj ne klare komprenis tion kaj opiniis Lincoln militemulo, kaj tio tre turmentis la prezidanton, same kiel la morto de ĉiu unuopa soldato. Soleca kaj kuraĝa li tamen plenumis sian devon ĝis la fino de la milito, sed la ŝarĝo de lia ofico ĉizis profundajn sulkojn en lia vizaĝo.

Post kvar longaj jaroj finiĝis la milito, sed nur unu semajnon poste — la 14-an de aprilo 1865 — sud-partia fanatikulo mortpafis Lincoln en teatro en Washington. Tiel la fatalo malebligis al la prezidanto lian entreprenon por justa paco kaj bona volo rilate al la Sudo.

Lincoln ne batalis por la demokrata ŝtato kiel celo en si mem, sed konsideris ĝin la sola rimedo por plene sekurigi la liberecon kaj respekton de la individuo. Ekzistas hodiaŭ tiuj, kiuj ŝajne konsideras "la ŝtaton" pli valora ol la individuoj ĝin konsistigantaj; neniam ili forgesu la famajn vortojn de Lincoln, ke "regado de la popolo, per la popolo, por la popolo, ne forpereos de sur la tero".

ESKIL SVANE

OFICIALA BULTENO

DE LA AKADEMIO DE ESPERANTO

N-RO 1 DECEMBRO 1958

Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro Enkonduko

En Novembro 1955 la Direktoro de la Akademia Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro, Prof. G. Waringhien, entreprenis fari inventaron de la Fundamenta kaj Oficiala Vortrezoro (vidu: Scienca Revuo, Vol. 7-a, N-ro 4-a de la 15-a de Novembro 1955, paĝo 137). Fundamenta estas vorto trovebla en la "Fundamento de Esperanto". Ĝi estas neŝanĝebla. Oficiala estas vorto aldonita al la "Universala Vortaro" per decido de la Akademio aŭ de la antaŭa Lingva Komitato.

La "Fundamento de Esperanto" fakte konsistas el 4 partoj: la "Antaŭparolo", la "Gramatikoj" (en 5 lingvoj), la "Ekzercaro" kaj la "Universala Vortaro". En la unuaj tri partoj troviĝas pluraj radikoj, kiuj ne estas entenataj en la U.V. kaj la Akademio nun decidis per tiu ĉi "Sepa Oficiala Aldono al la Universala Vortaro" pri la fundamenteco de tiuj radikoj. Parte ili krom tio jam estis oficialigitaj per unu el la antaŭaj Oficialaj Aldonoj. Al la radikoj de la U.V. oni do devas aldoni 118 aliajn, kiuj estas troveblaj en la 3 aliaj partoj de la Fundamento. Ili estas entenataj en la sekvanta

1-a LISTO:

FUNDAMENTAJ RADIKOJ

Al ili apartenas:

A. — 83 komunaj vortoj,

el kiuj 47 jam estas entenataj en unu el la Oficialaj Aldonoj (kies numero estas montrita interkrampe) kaj tie difinitaj aŭ tradukitaj. Por la aliaj la difino estas aldonita.

a = nomo de la litero a, unua litero de la Esperanta alfabeto
absolut' (1)
aktiv' (1)
alfabet' (1)
arĥaism' = vorto aŭ esprimo ne plu uzata en la komuna lingvo
aŭtor' (1)
aŭtoritat' (1)
bo = nomo de la litero b, dua litero de la Esperanta alfabeto
ba' (1)
co = nomo de la litero c, tria litero de la Esperanta alfabeto
centim' (1)
ĉo = nomo de la litero ĉ, kvara litero de la Esperanta alfabeto
ĉial = el ĉia kaŭzo, motivo
ĉies = apartenanta al ĉiu
ĉiom = tutkvante
do = nomo de la litero d, kvina litero de la Esperanta alfabeto
diplomat' (1)
diplomati' = arto, profesio kaj aro de la diplomatoj
dogm' (2)
doktor' (1)
dokument' (1)
e = nomo de la litero e, sesa litero de la Esperanta alfabeto
energi' (1)
fo = nomo de la litero f, sepa litero de la Esperanta alfabeto
fi (1)
fizik' (1)

fotograf' (1)
go = nomo de la litero g, oka litero de la Esperanta alfabeto
geograf' (1)
ĝo = nomo de la litero ĝ, naŭa litero de la Esperanta alfabeto
ho = nomo de la litero h, deka litero de la Esperanta alfabeto
ĥo = nomo de la litero ĥ, dekunua litero de la Esperanta alfabeto
i = nomo de la litero i, dekdua litero de la Esperanta alfabeto
ide' (1)
instituci' (1)
jo = nomo de la litero j, dektria litero de la Esperanta alfabeto
ĵo = nomo de la litero ĵ, dekkvara litero de la Esperanta alfabeto
ko = nomo de la litero k, dekkvina litero de la Esperanta alfabeto
kilometr' (1)
kompetent' (1)
kongres' (1)
kontrol' (1)
kopek' (1)
lo = nomo de la litero l, deksepa litero de la Esperanta alfabeto
literatur' (1)
mo = nomo de la litero m, deksepa litero de la Esperanta alfabeto
meir' (1)
million (2)
no = nomo de la litero n, dekoka litero de la Esperanta alfabeto
naiv' (1)
nenial = el nenia kaŭzo, motivo
neniom = nulkvante
o = nomo de la litero o, deknaŭa litero de la Esperanta alfabeto
po = nomo de la litero p, dudeka litero de la Esperanta alfabeto
paradoks' (2)
paralel' (1)
patent' (1)
pfenig' (1)
prefiks' (1)
princip' (1)
projekt' (2)

ro = nomo de la litero r, dudekunua litero de la Esperanta alfabeto
rezultat' (1)
so = nomo de la litero s, dudekdua litero de la Esperanta alfabeto
sankci' (1)
seen' (1)
sistem' (1)
sofism' (1)
special' (1)
sufiks' (1)
ŝo = nomo de la litero ŝ, dudektria litero de la Esperanta alfabeto
to = nomo de la litero t, dudekkvara litero de la Esperanta alfabeto
teatr' (1)
telegraf' (1)
teori' (1)
ties = apartenanta al tiu
tragedi' (1)
u = nomo de la litero u, dudekkvina litero de la Esperanta alfabeto
ŭo = nomo de la litero ŭ, dudekksesa litero de la Esperanta alfabeto
vo = nomo de la litero v, dudeksepa litero de la Esperanta alfabeto
valor' (1)
zo = nomo de la litero z, dudekoka litero de la Esperanta alfabeto
zoologi' (1)

B. — 35 propraj nomoj

angl' (nomo de ano de popolo)
Ann' (virina antaŭnomo)
Anton' (vira antaŭnomo)
Aŭgust' (vira antaŭnomo)
Berlin' (urbnomo)
Bert' (virina antaŭnomo)
Bulonj' (urbnomo)
Elizabet' (virina antaŭnomo)
Ernest' (vira antaŭnomo)
Esperant' (nomo de lingvo)
Eŭrop' (nomo de kontinento)
franc' (nomo de ano de popolo)
Georg' (vira antaŭnomo)
german' (nomo de ano de popolo)
hebre' (1-a Oficiala Aldono; nomo de ano de popolo)
hispan' (nomo de ano de popolo)
Josef' (vira antaŭnomo)
Kalvin' (vira nomo)
Klar' (virina antaŭnomo)
London' (urbnomo)
Ludovik' (vira antaŭnomo)
Luter' (vira nomo)
Nikodem' (vira antaŭnomo)
Nikola' (vira antaŭnomo)
Pariz' (urbnomo)
Paŭlin' (virina antaŭnomo)
Petr' (vira antaŭnomo)
pol' (nomo de ano de popolo)
rus' (nomo de ano de popolo)
Sofi' (virina antaŭnomo)
Stefan' (vira antaŭnomo)
Siller' (vira nomo)
Teodor' (vira antaŭnomo)
Vaŝington' (vira nomo)
Vilhelm' (vira antaŭnomo)

RIMARKO 1. En la Universala Vortaro troviĝas ekster la alfabeto ordo 10 propraj nomoj, jam konsideritaj en la inventaro de tiu parto de la Fundamento:

Aleksandr' (vira antaŭnomo)
 Emili' (virina antaŭnomo)
 Henriet' (virina antaŭnomo)
 Izrael' (vira nomo)
 Johan' (vira antaŭnomo)
 Mari' (virina antaŭnomo)
 Miĥael' (vira antaŭnomo)
 Nov-Jork' (urbnomo)
 turk' (nomo de ano de popolo)
 Varsovi' (urbnomo)

2-a Listo: Oficialaj Radikoj

Ĉiuj agantnomoj finiĝantaj per **-log'** kaj **-nom'** kaj respondaj al jam oficialigitaj sciencnomoj finiĝantaj per **-logi'** kaj **-nomi'** devas esti rigardataj kiel oficialaj. Al la Radikoj de la Oficialaj Aldonoj oni devas do aldoni 16 aliajn, kies responda sciencnomo troviĝas en la Oficiala Aldono montrita interkrampe: ili estas samsignifaj kun la respondaj formoj en **-logiisto** aŭ **-nomiisto**.

agronom' (1)	grafolog' (1)
antropolog' (1)	meteorolog' (2)
biolog' (1)	mineralog' (2)
entomolog' (2)	mitolog' (1)
etimolog' (2)	ornitolog' (3)
etiolog' (1)	paleontolog' (2)
fiziolog' (1)	patolog' (2)
genealog' (2)	zoolog' (1)

RIMARKO 2. La vorto **ekonomi'** ne estas konsiderita, ĉar la responda radiko **ekonom'** havas kaj ĉe Zamenhof kaj en la naciaj lingvoj tute alian sencan ol **ekonomiisto**.

RIAMRKO 3. Laŭ la voĉdono de la Lingva Komitato, publikigita en cirkulero de la 12-a de Majo 1923, la radikon (**analogi'(o)** de la 1-a Oficiala Aldono oni ŝanĝis al **analog'(a)** kaj **analogi'** ne plu estas oficiala.

3-a Listo: Oficialaj Radikoj

Kelkaj analogaj agantnomoj respondaj al abstraktaj nomoj finiĝantaj per grekdevenaj pseŭdosufiksoj, kiel **-grafi'** kaj kelkaj aliaj, estas samtempe oficialigitaj. Do nova grupo de 15 radikoj estas aldonita al la Oficiala Listo:

aŭtokrat' (3)
 bibliograf' (2)
 biograf' (2)
 etnograf' (2)
 geograf' (1)
 geometr' (1)
 homeopat' (1)
 kartograf' (2)
 kosmograf' (2)
 oligarĥi', oligark' (3)
 paleograf' (2)
 plutokrat' (3)
 teokrat' (2)
 tipograf' (1)
 topograf' (2)

KONKLUDOJ

La nuna voĉdono de la Akademio modifas la kalkulon de la Fundamentaj kaj de la Oficialaj Radikoj.

1. Fundamentaj Radikoj

La nombroj estas la jenaj:

Fontoloko	Komunaj vortoj	Propraj nomoj	Sumo
U.V.	2.612	29	2.641
Ekster U.V.	83	35	118
Sumoj	2.695	64	2.759

2. Oficialaj Radikoj


Post la aldono de la 2-a kaj la 3-a Listoj la nombro estas nun: 1.777. La fina sumo de la Fundamentaj kaj Oficialaj Radikoj estas do:
 $2.759 + 1.777 = 4.536$.

KRUCVORTENIGMO

PROBLEMO No 1

— Ĉiuj radikoj estas troveblaj en la lasta eldono de la Plena Vortaro

— R = radiko sola, sen finaĵo



HORIZONTALE: 1. Plej nova periodo de la supera paleolitiko (R) — 2. Ŝtonon, per kiu klingoj pli bone tranĉas — 3. Li redaktas la diversajn scenojn de filmo (R) — 4. Rezinoriĉa ligno (R) — Tiam ululas la noktoj — 5. La ŝtona nomiĝas petrolo (R) — Ĝentile estas trinki je tio (R) — 6. Sen flugiloj, ĝi estas ridinde afekta homo (R) — Por vino bona ne bezona (R) — 7. Ĝardenvojo (R) — Koncernas ŝarĝon de varoj sur ŝipo — 8. Konsulti la sorton — Speco de mustelo (R) — 9. Frakcio — Amerika sovaĝa besto, simila al lupo (R).

VERTIKALE: 1. Tie oni amuzigas nekonata — 2. Pedalon reguligantan la rapidon de motoro — 3. Grajneto — 4. Ĝi donas al unugrama maso la akcelon de po unu centimetro en sekundo (R) — 5. Eksteriganta siajn kapablojn (R) — 6. Per ĝi oni povas muziki aŭ pagi — Ĝi estas blinde imitema — 7. Solvaĵoj posedantaj miraklajn ecojn — 8. Sopirol al hejmo — 9. Bienmastrumisto (R).

DU STADIOJ SURVOJE AL MONDPACO

Nun mankas nur du postuloj, kaj pacon ni estos plenumintaj: La fido de la kontraŭuloj kaj ke ĉiuj montros sin indaj.

Kumbel (el dane trad. P. Thorsen)

Tra la Mondo

● **Brazilo.** Nilopoliso, ŝtato Rio de Janeiro. La 4-an de aprilo ĉijare estas inaŭgurita klaŝcambro en Kolegio Nilopolitano kun la nomo "L. L. Zamenhof". La kolegio apartenas al prof. Vashington Bittencourt, kiu enkondukis la instruadon de Esperanto en sian kolezion. Antaŭ kelkaj semajnoj okazis bela ekspozicio de Esperantaĵoj organizita de tiu progresema urbo — el ĉiuj plej foraj lokoj de la mondo oni sendis esperantaĵojn por la ekspozicio.

● **Britujo.** Rilate al la Zamenhofa festo en decembro en Londono unu propono por ĉi tiu Festo estas la aranĝo de sufiĉe digna vespermanĝo en hotelo aŭ restoracio, al kiu oni invitus kelkajn eminentajn gastojn. Oni opinias, ke la kosto estus po ĉirkaŭ 30 ŝ. Entute la Londona Esperanto-Klubo faras grandan propagandon por Esperanto okaze de la Zamenhof-jaro.

● **Bulgarujo.** En Sofia la semajna gazeto "Literaturen Front" — asocia organo de la bulgaraj verkistoj — en sia lasta numero publikigis dukolumnan artikolon de Kiril Drajev pri la Esperanta Antologio de W. Auld, eldono de "Stafeto".

Recenzante, la aŭtoro emfazas ĝian kompetentan redakton per elekto de poemoj el ĉiuj specoj, gustoj kaj skoloj.

La Esperanta Antologio — skribas la aŭtoro, — per kies paĝoj oni perceptas la spiron de la kultura mondo, respegulas la vojon de la rapide evoluanta originala Esperanta poezio, pruvante la valorajn kvalitojn de Esperanto, konvena al ĉiuspeca literatura uzo.

● **Ĉinujo.** La disvastiĝo de la Internacia Lingvo rapide floras en Ĉinujo, kie kursoj estis lastatempe malfermitaj en Ŝanhajo, Pekino, Ĉungking, Sian kaj en aliaj lokoj. Esperanto-organizaĵoj estas fonditaj en la Universitatoj de Pekino, Nankino, Seĉuan kaj en la Instituto de Fremdaj Lingvoj en Dajren.

● **Ĉinujo.** La kultura revuo "El Popola Ĉinio", kiu monate aperas en lingvo-Esperanto, malfermis kurson de ĉina lingvo por eksterlandanoj en la Internacia Lingvo. Esperanto estas cetere utiligata por diskonigi en eksterlando ĉinajn literaturajn verkojn.

● **Danlando.** En la komenco de aprilo s-ro doc. Pragano faris rondvojaĝon en Danlando fininte per 3 prelegoj en Kopenhago. Ĉie doc. Pragano fervore kaj inspire parolis pri la signifo de U.E.A. kaj instigis la aŭskultantojn esti individuaj membroj. Krome li faris grandan propagandon por la varbado de apogantoj. Tiun laboron devus fari ĉiu esperantisto — aŭ kel-

kaj kune por pli rapide havi la 10 apogantojn, kiuj estas bezonataj por 1 kvitanckajero. En ĉi tiu jaro la eblecoj estas pli favoraj ol kutime — do eluzu ilin, diris doc. Pragano.

● **Germanujo.** — FERIA kurso en Hustedt. Helpe de financa subvencio de la kultministro de Malsupra Sakso (Niedersachsen) okazis dum la paskaj ferioj 31.3. - 5.4. en la popolalilernejo Hustedt proksime de Celle esperanta seminario por ĝeinstruistoj. La kursgvidanto de tiu laboro estis s-ro H. Müller, Hannover.

Oni laboris en tri grupoj. La komentantojn instruis s-ro Murza, Celle, la progresintojn d-ro Klötzer, Hannover-Münden, kaj la studgrupon gvidis s-ro Bepperling, Wetzlar, la estro de la germanaj ĝeinstruistoj esperantistaj. Krome s-ro Kretschmer, Braunschweig, kaj d-ro Happach, Soltau, prelegis pri diversaj temoj. Du partoprenantoj faris kapablecan ekzamenon.

● **Finnlando.** En la lasta tempo la Esperanto-movado tre vigliĝis, kaj la gazetaro bone raportas pri la diversaj okazintaĵoj.

● **Francujo.** La franca radio (Francujo 111) malfermis lastatempe kursojn de internacia lingvo Esperanto, gvidatajn de Pierre Delaire. La kursoj okazas en la kadro de la edukaj programoj de la naciskalaj dissendoj.

● **Francujo.** S-ro René Llech-Walter, prezidanto de U.E.F., aŭskultas atente la klarigojn de la japana ĵurnalisto Joŝiko Kajino dum la preskonferenco en Perpignan, Francujo. — La ĵurnalistoj verkis gravajn artikolojn, en kiuj ili unuanime laŭdis la mirindan taŭgecon de Esperanto por universala interkomprenemo.



● **Hispanujo.** La hispana radio-stacio "Valladolid E.A.J. 47" komencis la dissendadon du fojojn semajne de nova kurso en Esperanto. La kurson gvidas Mariano Cantacapiedra.

● **Indonezio.** Malfermiĝis en Bandung la unua Esperantokurso, gvidata de la ĵurnalisto Datoe Toemenggoeng. Indonezia Esperanto-Asocio registras en la tuta lando vastan revigliĝon de intereso por la Internacia Lingvo.

● **Islando.** Por reagi kontraŭ la ignoro en la mondo de la literaturaj valoroj kreitaj en la islanda lingvo, la gazeto "Voĉo de Islando" komencis la

publikigon de "Islanda Antologio" en la lingvo Esperanto. La unua aŭtoro prezentita estas Gudmundur G. Hagalin, la plej elstara verkisto, kiu realece kaj psikologie detale priskribas la malfacilan vivon en la okcidentaj fjordoj.

● **Italujo.** Dank' al la senlaca propagando kaj laboro de Jozefo S. Boscarino, delegito de Itala Esp-Federacio por tuta Sicilio, la komunumo Ragusa dediĉis novan urban straton al Esperanto. La strato nomiĝas "Via Esperanto".

● **Kanado.** Tiun-ĉi jaron la Centro de Esperanto en Montrealo konsentis akcepti en Kongreso ĉiujn Esperantistojn en Kanado, sub la aŭspicio de la Kanada Esperanto-Asocio. La dato de tiu fiksiĝis al Vendredo, Sabato kaj Dimanĉo, la 19-a, 20-a kaj 21-a de Junio 1959.

La kontribuado por tiu-ĉi Kongreso estas nur \$ 10.00 po persono kaj pagenda per poŝtmandato al "C.E.M.", 9445 Millen Av. Montrealo 12, kie ĉiuj informoj estas haveblaj.

● **Pollando.** La grava soci-kultura semajna gazeto "Nowe Sygnaly" (Novaj Signaloj) aperigis novelon tradukitan el la originala teksto en Esperanto: "Lernantino" de la angla verkistino Marjorie Boulton. En Pollando estas anoncita la publikigo de pluraj libroj el la originalo en la Internacia Lingvo: inter ili "Retoriko" de la juristo prof. Lapenna, "Tra brazilaj praarbaroj" de la esploristo Tibor Sekelj kaj "La vivo de la plantoj" de la dana fitopatologo D-ro Neergaard.

● **Pollando.** La Katolika Universitato de Lublino malfermis lektoraton de lingvo Esperanto, gvidatan de Mag. A. Kolaczowski. La kursojn rajtas viziti ne nur studentoj de la Katolika Universitato, sed ankaŭ studentoj de la superaj lernejoj de Lublino.

● **Svedujo.** Sveda Esperanto-Federacio deziras informi al vi, ke ĝi ek de marto 1959 havas novan bultenon Esperanto Nytt (Esperanto-Novajoj) flanke de la jam konata La Espero. La nova bulteno aperas 4-foje jare, kaj la celo estas informi la svedan publikon pri la Internacia Lingvo kaj la progresado de la Esperanto-movado. Pro tio ĝi estas redaktata en la sveda lingvo.

Ĉiuj esperantistoj povas aboni por kiu ajn persono tiamaniere certigante, ke iu konatulo aŭtomate kvarfoje jare ricevas rapidan informon pri Esperanto.

SEF en aprilo novaranĝos sian gazetar-informadon paralele kun la informoj pere de Esperanto Nytt. Redaktoro de la sveda gazetara servo estas s-ro Ernfrid Malmgren, Stockholm.

• **Svedujo.** Al la kultursemajno en Frostavallen nun invitas la Sveda Unesko-Komisiono kune kun la Esperanto-movado, kaj Sveda Esperanto-Federacio traktos la oficialan agademon de Unesko mem.

• **Usono.** Esperanto-Societo de Cikaĝo sciigas, ke 5 anoj de E.S.C. partoprenis unu-horan radio-programon pri Esperanto. La estrino de la radiostacio, f-ino Deane Carroll, kondukis la diskuton.

Per la sama radio-stacio, la Societo elsendas ĉiusemajne 15-minutan Esperanto-lecionon.



• **Usono.** E.L.N.A. = Esp. Ligo por Nord-Ameriko starigis imponan "Migrantan Ekspozicion". Kun la titolo "70 years of Esperanto". La bildo montras tutan korbegon de fremdlandaj korespondantoj kaj prospektoj.

Cetere la ekspozicio enhavas la U.N.-afiŝojn pri la Homaj Rajtoj kaj diversajn altvalorajn librojn.

La baza materialo por tiu-ĉi "Migrantan Ekspozicion" estas kunigita kaj aranĝita de la Esperanto-grupo de St. Louis, Missouri. La celo estas dissendi tiun materialon al societoj kaj kluboj por starigi imponan ateston pri Esperanto okaze de la Zamenhof-jaro.



La Konkurso

Comella Bassols

Tiun konkurson, kiun starigis s-ro Jacint Comella el Vic memore al sia mortinta edzino, Dolores Bassols (kiu plurfoje gajnis literaturajn premiojn en Esperanto-konkursoj), partoprenis homoj el diversaj landoj kun entute 12 konkursaĵoj. S-ro **Kenneth Wilson, Britujo** per "La Rekompenco" gajnis la premion. (2-a konkurso sekvas).

La membroj de la juĝantaro estis prof. Miloš Lukáš, Ĉekoslovakujo, s-ro Gerald C. Jervis, Anglujo, s-ro L. Mimó kaj s-ro Francesc Vilá, ambaŭ el Hispanujo.

La premiodonacanto dankas la partoprenintojn al la konkurso pri la premio Comella-Bassols kaj gratulas kore la gajninton.

„NATURISMO“

Adaptado de l' vivmaniero al la kondiĉoj de la Naturo.

Regajnado de l' Dia suno por korpo kaj animo; malakcepto de ŝajnmorale ĉiuspeca, do ankaŭ kuraĝa flegado de purmora nudeco. Aktiva homaranismo k.t.p.!

Vasta agadkampo!

Ĉu ne centmiloj da "Naturistoj" de Kanado ĝis Nov-Zelando, almenaŭ en dudek landoj?! Ĉu mi do inter ili la sola esperantisto?

Fariĝu do ankaŭ vi FD. por Naturismo en via teritorio! Ni esperantigu la movadon, unue starigu **Naturisman Fakgrupon!** Kaj skribu tuj al mi!
Via

Helmuth Gerbert, fakta ofikconsilisto, D. kaj FD. por Naturismo, Blütenstr. 3, Linz/Ūrfahr, Aŭstrujo.

Esperantista Vivo

NASKIĜOJ

Tietti. — Al Veera kaj Hemmo Tietti en Letku (Suomio) naskiĝis 9-3'59 filino Silja. Esperanto, multajn jarojn la sola hejma lingvo de la gepatroj, restos tia por la tuta familio.

Grattapaglia. — En la kadro de la ne-oficialaj manifestacioj por la Zamenhofa Jaro, Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia anoncas ke ilia unua filo, Guido vige eniris la Tutmondan Rondon Familian!

Torino, la 11an de aprilo 1959.

GEEDZIĜO

Warner-Sack. — Geedziĝis la 24-an de aprilo s-ro Dipl.-Ing. Alfred Warner, FD en Frankfurt (Main), Germanujo, ISAE-komitatano, kaj f-ino Heiderun Sack, Walsrode (Hannover).

Piron-Sabathe. — La 20-an de decembro 1958 geedziĝis en New York s-ro Claude Piron kaj f-ino Nicole Sabathe.

Nekrologo

Pagenstecher. — La 1-an de februaro ĉijare mortis la sekretariino de la Esperanto-grupo en Bonn, s-ino Johanna Pagenstecher.

BINDITA JARKOLEKTO 1958

de la revuo "ESPERANTO", inkluzive de la belega kajero "BELARTO". Prezo: 10,50 gld.; 42 steloj. Por ind. membroj 1958: 6,50 gld.; 26 steloj.

Mendu ĉe U.E.A.!

RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj vidu la aprilan numeron.

Pola Radio dissendas ĉiutage duonhoran programon en Esperanto, je 15.30, per ondoj 50.21 m., 42.11 m., 41.12 m., 31.50 m., 31.45 m., 38.98 m. 25.39 m. kaj 249 m. (1205 kcs). Sendu raportojn pri aŭskultado al Pola Radio, Warszawa, Pollando.

Radio Sofia ŝanĝis siajn ondlongojn. Vidu la majan numeron.

Radio Zagreb. 4-VI, Recenzoj pri la novaj libroj; 11-VI, Mozaiko-kuriozaĵoj; 18-VI, Pri la Jugoslavia sporto; 25-VI, Primovadaj novaĵoj kaj respondoj al la korespondantoj.

Radio Roma. 2-VI, Tra la literaturo; 5-VI, Itala klimato stacio Anzio; 9-VI, Leterkesto kaj bibliografio; 12-VI, Novaĵoj el Italujo; 16-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto; 19-VI, Granda pensulo Galileo Galilei; 23-VI, Granda Sanktulo Johano Baptisto; 26-VI, La dua jarcento de la itala literaturo; 30-VI, Italaj kanzonoj en Esperanto. Krome, ĉiun merkredon, kuriero de Esperanto.



44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1-8 aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko JOZEF CYRANKIEWICZ

Adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio.

